# Kajeroj el la Sudo

*BULTENO DE **H**ISPANA **A**SOCIO DE **L**ABORISTOJ **E**SPERANTISTAJ (HALE)*

**http://www.distrito.com/esperanto/k43.htm**

**http://members.xoom.com/Jesuo/k43.htm**



## Militklavoj

Kiel krimuligi vian infanon

## Ĉu nacio indas eĉ unu vivon?

**Nº 43** **Julio/Septembro 1999**

# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**



*Prezidanto:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*c/ Jabonerías, 6-3ºD,*
*ES30 001 Murcia (Hispanio)*

*Vicprezidanto: ankoraŭ neniu oficas*

*Kasisto:* ***José María Bernabéu Franco***
*Gral. Primo de Rivera, 8*
*E-03360 Callosa de Segura,*
*ALICANTE (Hispanio).*

*Sekretario:* ***José Pina Tuells,***
*c/ Stª Teresa, 22-2º CD,*
*ES30005 MURCIA*

*Libroservo:* ***Nicolás Gil Carballo,***
*Apartado 305*
*ES24080 LEÓN*

*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Apartado 4461*
*ES30080 MURCIA*


*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la* **nova konto** *nº* **1302 0412 86 0022655110** *en libreta de Caja Postal. Sen aldona kosto.* La abono kostas 1000 pesetojn aŭ 6 eŭrojn. Kvintancon oni ricevos.

*Pretigas la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Administro:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras Jiménez.**

**Kovrilo**: *Senviva serba soldato kuŝas sur kosova grundo. Li ne plu havas malamikojn. Ĉu oni eblas amikiĝi antaŭmorte?*

Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

*Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mis-traktas iun ajn personon.*

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*

# Enhavo


Redaktore ..... 3
Informoj de la Prezidanto ..... 4
Antologio por junulo: ..... 5
Malskribemuloj ..... 6
La krizo de HALE kaj miaj kialoj ..... 7
Naciismo estas merdo! ..... 8
Kiu zorgas? ..... 12
Krio el Jugoslavio ..... 13
Novaĵoj de la milito ..... 29
Reguloj, por ke via infano iĝu krimulo ..... 30
Enkonduko en muziko: voĉoj ..... 31

## Redaktore:

### Esperanto kaj mondo.

La lastan aprilon ni kongresumis en Lorko unuafoje. Multaj esperantistoj sendis mesaĝojn sukcesdezirantajnal ni. Bone, mi ne scias, kion diri pri la sukceso de la kongreso. Vera sukceso ja estas, ke la kongreso okazis! Ni ne estis multaj, sed ni faris multe da bruo. Ni diskutis, ni prelegis, kaj ankaŭ ne mankis, kiu volis pugnobati...



La prelego matena temis pri *Civila malobeemo kaj Esperanto*, kaj kvankam ni ne povas oferti ĝin nun pro manko da spaco, ni prezentos ĝin al vi en la venonta numero de nia revuo.

Pri la temoj diskutitaj dum la kongreso informas la Prezidanto en la dorso de tiu ĉi paĝo.

Vi vidos, ke ĉi numero de ***Kajeroj el la Sudo*** prezentas grandan spacon pri la Milito de Jugoslavio. Zoran Ciric estas vendisto, kiu loĝas en Niŝ, serba urbo dure punita dum la milito. Li informis nin per Interreto, kaj mi opinias, ke utilas ege siaj opinioj, por ke la samideanoj kiuj ne havas tiun elektronikan rimedon ankaŭ povas havi duan opinion pri tiu sensenca milito..., kvankam nun kelkaj okcidentaj artikolistoj ekas kompreni ĝiajn ekonomiajn kialojn.

Ankaŭ ni inkluzivas informon pri ***Juna Amiko***, kaj kelkajn artikolojn pri fruktdonema verksoifo, pri naciismo -el sennacia vidpunkto, kompreneble- kaj *atipikaj* artikoloj pri apolitikismo kaj krimulismo.

Mi esperas, ke vi ĝuos tiun numeron, kaj ke vi kontribuu por la venonta numero de ***Kajeroj el la Sudo***.



*La redaktoro*

# Informoj de la prezidanto



Saluton, haleanoj!

Dum la pasinta monato de aprilo HALE kongresumis. Ĝi estis la unua kongreso: dum unu tago haleanoj parolis Esperanton, promenis en Esperanto, diskutis en Esperanto. Dum la mateno ni vizitis la urbon kaj, mi, kiel profesoro pri Historio, ĉiĉeronis pri la artaĵoj de Lorko, kaj montris kaj klarigis pri ties monumentoj.

Poste, dum la vespero, HALE malfermis la unuan kongreson kaj la plej grava afero pridiskutita estis la Milito en Jugoslavio. La plej parto de haleanoj opiniis, ke ekzistas esperantistoj en Jugoslavio, kaj same en Kosovo. Esperantisto diris, ke li *havas amikojn en Serbio kaj en Kosovo. Mi kondamnas la bombadon en Jugoslavio kaj mi ankaŭ kondamnas la elirigon el Kosovo de ties civitanoj*.

Alia opinio estis tre konciza, tre klra, tre rekta: li diris, ke li *kondamnas la agadon de NATO sur Jugoslavio farite per mono pagita de niaj impoŝtoj, do la sola solvo por iomete senkulpigi al ni mem estas publike rifuzi nian apogon al niaj politikistoj, kiuj perfidis nin,* kaj *ke tio estas milito sen deklaro.*

Ni parolis, ni diskutis pri la bombado, kaj finfine ni fermis la kongreson.

La sperto diris, ke:

1 La venonta kongreso de HALE devas daŭri do tagojn.

2 La granda diskutado devas daŭri nur du horojn.

La venontan jaron ni havos la Duan Kongreso de HALE en alia parto de Hispanio. Ĉar la plej granda parto de HALE loĝas ĉirkaŭ la Mediteraneo, ni devas kongresumi en alia parto de la lando, kie nia asocio ne estas tiel forta, por plifortigi ĝin tie. Aliflanke, la taskoj antaŭ kaj por tiu kongreso dua estas jenaj:

1 Plibonigi HALE.

2 Planado de varbado pri HALE.

3 Kunlaboro de HALE kun aliaj asocioj neesperantistaj.

4 Organizi altnivelan kurson de Esperanto por haleanoj.

Mi esperas, ke la temo de la venonta kongreso de HALE estos halea temo, kaj la temo de la dua tago estos pri la movado aŭ socialaj aferoj.

En ĉi numero aperas polemiko pri HALE. Ni finu tiun polemikon per ĉi numero de ***Kajeroj el la Sudo***. Tamen, nia volo estas, ke ĉiu problemo de HALE devas aperi en la revuo, por ke ĉiu ano konas pri la afero.

*Johano Antono*

# *Antologio por junuloj*

Aperis fine de februaro la plej dika numero en la 26-jaraĝa historio de




*Juna amiko*. Ĝi elstaris ne nur pro la 52-paĝa amplekso, sed ankaŭ pro kolora foto sur la kovrilo de junuloj en la Infana Kongreseto en Montpeliero. Ekde nun, la revuo regule logos junulojn kaj lernantojn per plenkoloraj kovriloj.

Nur tri redaktoroj (tri naciecoj, unu loĝlando) gvidis la revuon tra ĝia kvaronjarcento; ili kunlaboris en la malfacila tasko elekti la kremon el la 87 aperintaj numeroj. Kvardek ok artikoloj travivis ilian krikbrilon, kun aŭtoroj el 23 landoj kaj ĉiuj kontinentoj, inter ili Baghy, Boulton, Jevsejeva, Kalocsay, Palu, Potts, Ragnarsson kaj Rössler. Praktike ĉiu jaro de 1974 ĝis 1995 reprezentiĝis.



La telegramisto

Laŭĝenre: poemoj 13, artikoloj 9, ŝerc(ar)oj 3, enigmoj 2, kantoj 2, teatraĵetoj 2, bild-strioj 2, tabul-ludo 1, rol-ludo 1, alia 4.

Rimarkinde, ke Géza Kurucz (Hungario) redaktis la revuon ekde la prov-numero fine de 1973 tra naŭ jaroj, kaj tamen akceptis repreni la taskon denove ekde 1997. Ankaŭ, ke ilustraĵoj de Pavel Rak (Ĉeĥio) aperis jam en la dua numero, kaj en la antologia kaj en prekaŭ ĉiuj inter ili aperintaj.

Perantoj en trideko da landoj akceptas abonojn por 1999 (la antologia numero estas 99/1). La tarifoj varias laŭ loĝlandoj. La antologian numeron oni povas aĉeti aparte je 3,60 eŭroj aŭ 7,80 NGL ĉe ILEI aŭ aliaj libroservoj. Neabonantoj mendu ĝin aŭ petu alian specimenan numeron ĉe ILEI, p/a p.f. 193 HU-1368 Budapest, Hungario.



*Diplomato kaj soldato*

# Malskribemuloj

*Responde al **Al la legantoj** kaj **El la redaktejo** de **Sennaciulo** n-ro 1126 (aprilo de 1999)*

Skribi estas bezono, hobio aŭ arto. Tiujn, kiuj ne scias skribi, oni konsideras ignorantoj, kompatindaj stultuloj. Ili povas esti ĉarmaj homoj, sed ili povas komuniki nenion, nur parole ili komunikas.

Ĉiutage oni bezonas skribi sian nomon kaj subskribi iun ajn paperaĵon: oficialan peton por identigilo, aŭ telegramon al amiko dirante, ke ni venas, telefonnumeron de belulino, ion por fari poste, liston de aĉetotaĵoj kaj maltiel ne plu...


Homoj esperantiĝas kutime pro volo komuniki kaj limigo pri lingvoj. Jes, certe oni opinias, ke estas bona ideo, ke ni ĉiuj interkomprenas unu al la alia per komuna lingvo, sed tio estas pruvo, ke oni *volas komuniki*. Se telepation oni regus, malmankus lingvojn, inkluzive Esperanto. Bedaŭrinde, la plej efika maniero komuniki distance estas skribaĵo. Se oni ŝatas paroli, oni ŝatas skribi: anstataŭ multekostan telefonon, oni uzas plumon kaj paperon. Komuniko estas malpli rapida kaj flua, sed malpli multekosta, ankaŭ. Kaj eble skribo donas la solan restantan ŝancon ekscii la tutan enhavon de la komuniko de nia korespondanto: interrompo ne eblas!

Inter tiom da skribsciantoj ekzistas nur kelkaj centoj da skribhobiantoj: ili ĉiuj ĝojas legi, kaj opinii. Bedaŭrinde, al multoj el ili mankas kondiĉo por verki: kuraĝo. Pro tio, ke ili kritikas —kelkfoje akre— kion ili legas, ili ne volas esti kritikata. Tio ne noblas, evidente, sed realas. Tiu, kiu ne kuraĝas montri la *bonan verkaĵon*, silentu, bonvolu. En tiu iluzia —kaj feliĉe neniam ekzistanta — lando *Esperantio* (kiu kuŝas en la idea mondo de Platono) abundas tiaspecaj esperantistoj kiu ja scias *kiel oni **ne diras** tion*, sed samtempe ili ne montras kiel *oni faras* bonan verkon. Tie kuŝas, mi kredas, la kialo de tiom multe da legantoj kaj samtempe tiom malmulte da *legigantoj*, tio estas, verkantoj.

Ni, kiuj hobias verki, kiuj amas legi niajn verkaĵojn, kiuj eble estas belaj sole al ni, estas certe en la vojo al arto. Ĉar la dia sparko ne ekzistas en literaturo, sed ekzistas nur multego da laboro, pruntepreno kaj eĉ simpla rabo.

Do, verkigi esperantistojn estas malfacila tasko, kvankam pli facila ol en alia etoso, ĉar kutime esperantistoj estas kleraj personoj, fakte pli kleraj ol siaj sametosuloj neesperantistaj.

Konklude, mi diras, ke la literaturaj artistoj de la estonto troviĝas inter tiu multego da kritikataj kaj kritikitaj skribantoj nunaj. Eble pro tio, ke la kritikantojn oni ne plu legos: ilia prozo estas terura kaj malalta!



Reagoj

# *La krizo de HALE kaj miaj kialoj,*

*de Nikolao Ŝil Karbaĝo*

Post legi lastan numeron de nia asocia organo, mi opinias necesa skribi respondon al kvazaŭakuzo pri *fundaj atakoj al HALE*.

Unue, mi plendas, ke la artikolo *La krizo de HALE*, sufiĉe grava afero por mi, estas mallonga artikoleto kiuj ne funde pritraktas la krizon kaj ne informas la membraron pri tio, kio okazis, punkton post punkto. Krome ĝi akuzas min, kiu ne akceptis la vicprezidantecon, esti kaŭzo de krizo en HALE, kiu nun ne havas vicprezidanton. Aldone la artikolo aperas sen subskribo, do anonime, kaj en la lasta paĝo de la bulteno. Tiom grava temo ne indis je komenca loko, ĉu? Kaj..., ĉu oni devas konjekti, ke la artikolo spegulas la opnion de la asocio aŭ nur de la redaktanto?

Alia afero estas la mencio de iu letero mia al la prezidanto, kiun oni konsideras ne privata, sed kiun oni ne publikigis por ĝusta kaj justa prijuĝo de la membraro. Ne nur ne publikigis sed oni mise skribis parton de tiu letero. Se la afero ne estas privata do publika, kial ne publikigi ĝin? Aldone pro *fundaj atakoj al HALE*, kiun supoze entenas la letero, oni devigas *atentigi la anaron pri tiu krizo*. Ĉu en alia okazo oni ne estus atentiginta la membraron? Kion do, oni estus farita tiam? Ĉu muti, silenti?

Mi ne volas lacigi per tro da demandoj, sed tiujn ĉi mi konsideras oportunaj:

En la unua paragrafo oni diras, ke la Prezidanto ne povis aranĝo la aferon sufiĉe frue antaŭ la prezento de sia skipo al la balotanaro. En la tria paragrafo oni mencias, ke la prezidanto, la ĝisnuna vicprezidanto, la respondeculo de la libroservo kaj la bultenredaktanto kunvenas ĉiusemajne. Nu, almenaŭ du el tiuj kvar personoj havas mian telefonnumeron. Kial oni ne telefonis al mi almenaŭ por informi, ke oni proponos min kiel vicprezidanto kaj peti mian opinion, se ne konsenton? Kion mi devas opinii pri tia agadmaniero, ke ĉio funkcias bonege?

Mi estis ĝis nun la respondeculo de la libroservo. Oni anstataŭis min. Neniu ankoraŭ kontaktis kun mi por informi min nek por aranĝi la transdonon de la librostoko, kiun mi prizorgas. Mi atentigas, ke sen libroj ne eblas funkciigi libroservon. Kompreneble mi restas je via dispono por tion aranĝi.

Ĉu dum multe da tempo mankos detalan raporton pri tio, kio okazis? Mia sincera opnio estas, ke ni devas ĝisfunde klarigi kio okazis kaj ne lasi mallumajn punktojn nek nubojn sur nia vojo.

Fine, mi volas sincere esprimi , ke mia intenco ne estas ataki iun. Mi nur volas atentigi, ke oni forgesis diri multon el kio rilatas la aferon kaj oni devas ĉion scii por ne naskigi konfuzojn. Estas tempo aranĝi tion plene kaj turni paĝon al nia eduka kaj konstrua tasko.

*Nikolao Ŝil*

NOTO de la redaktoro.- Pro tio, ke ***Kajeroj el la Sudo*** ne estas hundbatalejo, mi pritraktos kelkajn punktojn starigitajn de kamarado Nikolao venontkajere, se ankoraŭ taŭgas.

# Naciismo estas merdo!

Mi tute konsentas pri aserto esea de Gary Miklo en ***Lea/G Magazino*** (paĝo 8-a). Lia konkludo venas el eventoj en Germanio okaze de montro kontraŭ milito en Jugoslavio.

Nia televidoj, veraj armiloj ŝtataj kies celo estas cerbobano -sukcesa preskaŭ ĉiam, mi opinias- alkutimiĝis al ni pensi, ke ekzistas diablo sur tero nun, kies nomo estas *Slobodan Miloseviĉ*. Li, kaj nur li, kaŭzis situacion kontraŭhomrajtan antaŭ kiuj decaj ŝtatoj ne povis ne kontraŭi mortige.

Nun ni komencas scii pri la dorson de tiu medalo, kaj kelkaj ĵurnalistoj komencas denonci, ke vero ekfiltras tra la malveraĵa reto de aliĝintoj. Laŭ Seth Ackerman, (FAIR [6-2-99], http://www.fair.org/press-releases/kosovo-talks.html), *We intentionally set the bar too high for the Serbs to comply. They need some bombing, and that's what they are going to get* (Ni intence metis la limon tro alte por ke la serboj povu akcepti. Ili bezonas bombadon, kaj tion li havos). Tiujn sensencajn vortojn estis dirita de grava funkciulo de NATO post la jugoslava rifuzo al paca plano. Sed tiu novaĵo povas esti malakceptata, ĉar la citita *grava funkciulo de NATO* kompreneble ne permesis, ke oni uzu sian nomon, kaj oni povas diri, ke tiu pruvo estas malforta.


Parlamento de Jugoslavio

Fortiĝas, tamen, la propraj vortoj de aliĝintoj: *Milosevitch estas diktatoro, li forpelis kaj murdis kosovanojn el sia domo, li pekis kontraŭ Homaj Rajtoj. Oni devas juĝi lin pro krimoj kontraŭ homeco*.

Tiujn argumentojn ripetadas la novaĵaĝentejoj okcidentaj (aliĝintaj, kompreneble) penante kaŝi tion, kio estas vero: bombado tute ne favoras homajn rajtojn. Sed ni ne eliru aliĝintajn argumentojn:

1 *Slobodan Milosevitch estas diktatoro.* Slobodan Milosevitch estis elektita tra liberaj balotado. Kiam NATO (kontraŭleĝe, sed tion oni analizos poste) ultimatumis Jugoslavion, Slobodan Milosevitch alvokis la jugoslavan parlamenton kaj demandis kion fari. Parlamenta balotado diris 100 pocente, ke ne. Sekve, bombado komencis. Antaŭ cedi al pretendo de NATO, Milosevitch denove alvokis parlamenton kaj demandis ĉu oni cedu, aŭ ne. Parlamento diris, ke jes, kontraŭ 74 parlamentaroj,

kiuj volis rezisti ankoraŭ. Aliflanke, William Klinton tute ne alvokis sian parlamenton -la Kongreso de Unuiĝintaj Ŝtatoj. Tony Blair, Schroeder kaj la aliaj landestroj ankaŭ ne konsultis siajn respektivajn parlamentoj, sed uzante povon, kiun ili ne havas laŭ siaj koncernaj landaj konstitucioj, ili decidis bombadi landon, kiuj neniam agis kontraŭ ili. Do, karaj legantoj, se diktatoro estas tiu, kiu diktas kion fari sen konsulti la popolon, kiu estas diktatoro: Miloseviĉ aŭ la polinomio Klinton-Ŝroeder-Blair-Aznar-kaj tiel plu ĝis 19 landestroj?



Ŝtatestroj aplaŭdas disigon de ŝtato en 1991

2 *Milosevitch estas krimulo kontraŭ Homaj Rajtoj kaj li forpelis kosovanojn el siaj domoj kaj ankaŭ murdis multe da ili.* Mi tion ne vidis. Oni mensogis al mi dirante, ke li estas diktatoro. Kial mi kredos pluajn mensogojn de la sama mensogistoj? Evidentas, ke estis murdoj en Kosovo, sed kredi, ke tio estas faraĵo de nur unu persono estas konsideri, ke ni estas senkulturaj geinfanoj, kiuj kredas ĉion. Problemojn kaŭzas multaj faktoroj, kaj mortigo ne venas el aero. Evidentas, ke kosovanoj ne volas aparteni al Jugoslavio. Sekve, ili kreis terorisman organizon similan al hispana ETA kaj IRA nordirlanda. Hieraŭ loka ĵurnalo de Murcia -*La verdad*- informis, ke grupo de kosovanoj rabis bankon ĉi tie, kaj parton de sia kaptaĵo ili sendas al gerilo kosova. Sed estraro jugoslava ne estas politike centrisma kiel en Hispanio, aŭ laborisma kiel en Britio, sed dekstrisma. Kial tiu partio atingis la povon? Eble ĉar en 1991 okcidento protektis sendependiĝon de Kroatio kaj aliaj kvar partoj de Jugoslavio. Naciisma sento en Jugoslavio disiĝis, kaj naciisma partio, kiu neniam antaŭe povus preni la povon, atingis plejmulton fare de turpa premo eksterlanda. Oni kulpigas Miloseviĉon pro tio, ke li parolas pri la *Granda Serbio*, same kiel Hitler parolis pri la *Granda Germanio* antaŭ 50 jaroj, forgesante, ke la hitlera intenciita lando estis la mondo tuta, sed la Granda lando de Miloseviĉ estas nenio pli ol la Jugoslavio de Tito. Fakte li volas nenion pli ol Abraham Lincoln volis en la lasta jarcento, kiam 13 ŝtatoj provis efektivigi siajn *rajton pri aŭtodetermino*. Tiu milito -la usona civila milito- estis kruela, kaj kelkaj aŭtoroj diras, ke ankoraŭ la sudo ne resanigis siajn vundojn -eble Ku Klux Klan estas la plej elstara vundo-. Sed tiam ne ekzistis *monda ĝendarmo* arbitracia kiu bombadu Usonon...

Kosovo ĉiam apartenis al Serbio. Antaŭ longe komencis migrado al suda parto de Serbio, Kosovo, fare de albanoj. Kiam ili plejnombras, ili diras, ke ili volas sendependigi la teron, kiu gastigis ilin.

*3 Oni devas juĝi Miloseviĉ pro krimoj kontraŭ homaro*. Premiero Toni Bler (Tony Blair) el Britio avertas televide,

ke *oni ne helpos rekonstrui Jugoslavion se Miloseviĉ ne estas juĝita de internacia tribunalo*. Kion la brita ĉefministro devas fari antaŭ ĉio estas sendi Aŭguston Pinoĉeton al Hispanio tuj por ke oni faru tion, kion li nun predikas, rilate al tutaj la krimoj kiujn li vere faris, aŭ eĉ pli bone, ke *internacia tribunalo* juĝu la oldan generalon en Londono pro tio, ke li kaŭzis la mortigon de miloj da inocentaj personoj en Ĉilio. Mi ne komprenas, ke anstataŭ fari tion, li postulas, ke kolegon sian, kiu ankoraŭ aktivas kiel Premiero, oni juĝu per tribunalo *internacia* (ni vidos kiel kaj kies sendependa). Ni iam ekscios pri la veraj celoj de la aliĝintoj. Nuntempe ni scias, ke ties aviadiloj mortigis senkulpajn geinfanojn, virojn kaj maljunulojn (ankŭ gejunulojn) kies sola kulpo estas loĝi en Serbio. Tio ja estas krimo kontraŭ Homaj Rajtoj, kaj ĝia graveco ne dependas el kvanto aŭ la celo. Se mi eraras stirante mian aŭtomobilon, mi devas pagi mone -aŭ karcere, laŭ la okazo- pro mia eraro. Mi volas scii kiu kaj kiel pagos tiuj homoj kiuj kaŭzis *kunflankajn* erarojn,







kiuj rezultis en morto kaj detruo sencela. Juĝu Miloseviĉon ja estas interesa precedento. Ĝi ebligos, ke tiu sama tribunalo juĝu ankaŭ al Sinjoroj Netanjahu pro krimoj kontraŭ sendefendaj civiluloj en Libano, sed ankaŭ oni povus juĝi al sinjoroj Bler, Klinton kaj ĉiujn aliajn, kiuj povis halti la sangversado en Jugoslavio. Kaj ni ne forgesu tiujn krimulojn, kiuj kaŭzis du miljonoj da mortoj en la usone provokita kaj malvenkita milito de Vjetnamo, al ĉiu politikistoj aŭ militistoj implikitaj en la tiu milito (ni ne forgesu la tribunalo tiucela starigita de genia filozofisto Bertrand Russel). Kaj la inocentajn civilojn loĝante en Hiroŝima kaj Nagasaki, kies murdisto havas nomon: Harry S. Truman.

Kion devintus fari la aliĝintoj? Dekomence, ili neniam devus agnoski sendependon de Kroatio kaj aliaj partoj de Jugoslavio sen referendumi antaŭe en la tuta Jugoslavio. Due, ili devus elspezi helpon abundan en Jugoslavio, ĉar mizero kaŭzas malsolidaron, kaj ofte militon. Jugoslavio estis unu el la plej stabilaj landoj en la mondo antaŭ nelonge. Dum la Dua Mondmilito la germanoj disigis ĝin, kaj *ustaŝoj* el sendependa Kroatio murdis multajn serbojn, kaj reage serbaj *ĉetnik*oj faris same. Kiam Tito atingis la povon, li ne nur pacigis la landon, sed li ankaŭ haltis Ŝtalinon en 1945. Evidente Ŝtalin povus




konkeri la landon tiam, sed la kosto estus tro alta por la sovetoj, kiuj ĵus venkis en la Dua Mondmilito.

Kiam Jugoslavio estis unio, do, ĝi estis paca kaj forta. Ĝi gvidis la partio de la *nealiĝintaj landoj* de la mondo. Nun la ses jugoslavidoj estas malfortaj kaj batalemaj. Tio estas rekta sekvo el naciismo.

Kio estas naciismo? Naciismo estas aserto, ke *nia* maniero vidi la mondon superas ĉiajn kaj ĉies ajn aliajn. Kiam mankas rimedojn por ĉiuj, *nia* intereso superas aliajn. *Ne kunhavo, anstataŭo* ŝajnas esti slogano de naciisma doktrino (kutime dogma kaj propaganda). Stanley Kubrick fotis tion en sceno de ***2001: odiseo en spaco*** pri simioj apud marĉeto: ĉar endis batali por ne kunhavi malmulton de akvo, oni eĉ inventis bastonon por frakasi alies kranion. Ne ekzistas en la mondo sendependiĝo sen *sendependa milito* (senkulpigate de Mahatma Ghandi, eksterordinara homo, kiu tute komprenis danĝerojn de naciismo, kiu mortigis lin). Ĉar ne ekzistas sendependa persono, sed ni ĉiuj dependas unu de la alia, la sola maniero konstrui longdaŭreblan mondon, estas fari tion ni kune. Pro tio ni devas kondamni militon **ĉian**, kaj kompreni, ke NE EKZISTAS **bona** aŭ **justa** milito. Se oni opinias, ke oni devas trudi opinion, aŭ iun ajn aferon, oni komprenu, ke komuniko malsukcesis, kaj longdaŭre ne gravas, tiuokaze, ke oni aŭskultu nin aŭ ne. Se Okcidento ne estus aganta en Balkanio, eble buĉadon oni ne haltigus, sed niajn manojn ne malpuriĝus sango balkana.

Pro tio, ke alies naciismo eĥis tiun nian, ni konkludas, ke naciismo estas vere merdo, kaj same kiel feka merdo, ju pli oni movas ĝin, des pli da merdo estas en niaj manoj, estante ankaŭ ni






respondeculoj pri la fina formo de tiu merdo, kaj ni iĝas merdistoj. La sola solvo pri merdo estas forbalao aŭ purigo. Por purigi tiun merdon for el nia vivo ekzistas nur unu purigilo: *funda sennaciismo*. Ni rilatu al najbaro, kaj folkloraj diferencoj restu nur folkloraĵoj por ĉiam.

Mi aŭdis en radio hodiaŭ, ke la milito ja finis. Ĝi kostis al ĉiu hispano 4.6 eŭrojn. Ili estas miaj plej multekostaj eŭroj. Miaj aliaj eŭroj kostis min nur laboron. Tiuj malfeliĉigaj 4.6 kostis al mi multe pli. Parto de mi mortis ĉiufoje, kiam okmiljonpeseta bombo falis sur Jugoslavio.

*Eŭlalia Rŭiz*



## What's the buzz?

Kio estas la celo de la milito en Jugoslavio? Dum du monatoj la plej malvolvita militmaŝinaro dediĉis sin al detruado de sendependa, suverena lando kiu neniam agis kontraŭ alia lando. Nun estas en Jugoslavio pli ol 20 000 fremdaj soldatoj, kiuj ne sufiĉas kontroli la loĝantaron, kaj sekve sangversado daŭras tie. Se serbaj soldatoj kulpis pro tio antaŭe, nun NATO soldatoj kulpas pri nuna sangversado.

Kio okazos post kiam la koncernaj landoj -eĉ estante tiel riĉaj kompare al Jugoslavio-ne plu povas havi siajn armeojn en Jugoslavio? Kiu povus malebligi Serbion invadi Albanion kaj *solvi* sian *albanan problemon*? Pacon, sinjoroj, oni atingas alimaniere. Se oni ne scias kiel atingi ĝin, oni ne ludu kun dinamito.

*Eŭsebio*

## Kio gravas?

*Ne gravas al mi, ke aliuj decidas pri tiu ĉi malbonodora lando. La Hispana Ŝtato estas tre granda, kaj ne interesas al mi, ke oni pligrandigas impoŝtojn nerektajn; tute ne interesas al mi, ke oni favoras privatan edukadon kontraŭ tiu publika. Kiel rilatas al mi, ĉu oni aprobas aŭ malaprobas leĝon pri aborto, se mi ne estas virino? Pro tio, ke mi ne loĝas en Baskolando, E.T.A. kaj feinoj estas same al mi. Se Usono bombadas Afganistanon, tiu ĉi certe kulpos pro io, kaj usonanoj pravas. Honduranoj domaĝas ĉi-jare; eble venontjare ili povos gajni la Pokalon de l' Mondo. La sola aspekto kiu ĝenas al mi pri la Klinton-Lewinski afero estas, ke mi ne sukcesas, ke oni faras same al mi, kiel ŝi faris al Vilĉjo.*

*Kio sole gravas vere al mia vivo estas, ke mia futbala teamo gajnu la Pokalon de Eŭropo kaj ke morgaŭ mi sukcesos havi postenon en kiu mi laboros tre malmulte kaj gajnos multe da mono. Kiel bele estas, esti apolitika!*

*Toloyen*

# Krio el Jugoslavio

*de Zoran Ciric*

*Post du monatoj ni atestis senhelpigeble militon en Jugoslavio, fare de tiuj registaroj, kiuj diras, ke ili reprezentas nin. Ni ankaŭ ricevis, sendefende, tonoj da propagando -la propra maniero prezenti la novâjojn ja estas propagando-. Por kontraŭi tion, kaj por ke ni povu eltiri niajn proprajn konkludojn, ni memoru, ke serboj ne estas diabloj, sed homoj, same kiel ni, kiuj suferas, soifas, malsatas kaj timas, lacigas, malamas kaj amas, same kiel ni.*

*Unu el tiuj homoj, Zoran Ciric, travivis la plej amarajn tagojn de sia vivo dum la milito. Li rakontis al ni pere de Interreto.* ***Kajeroj el la Sudo*** *ofertas lian rakontadon nun, kvankam ĝi estas tre longa. Ni pensu, ke kio okazis en la plej stabila lando el la mondo dum ĉirkaŭ 50 jaroj, ankaŭ povus okazi ĉe ni.*

*Mi ankaŭ inkluzivas la adresaron, kiu ricevis la mesaĝaron de Zoran.*

***La redaktoro***

X-From_: zcnis@cent.co.yu Tue May 4 18:18:29 1999
Reply-To: “Zoran Ciric” <zciric@eunet.yu>
From: zcnis@cent.co.yu (Ciric Zoran) To: “Josenilton Passos do Nascimento” <kongreso@svn.com.br>, “Jorg de Mulder” <jorgo@agoranet.be>, “Jean-François Colson” <espocolsonjf@hotmail.com>, <espero@freemail.c3.hu>, “Ilja B.S. De Coster” <Ilja.DeCoster@rug.ac.be>, “Hoŝida Acuŝi” <czw06615@nifty.ne.jp>, “Heroldo” <heroldo@tin.it>, “Francesco Amerio” <f.amerio@agora.stm.it>, “fernandopita” <fernandopita@openlink.com.br>, “Eventoj” <eventoj@hungary.net>, “esperanto.en.vendomois” <esperanto.en.vendomois@mail.dotcom.fr>, “Esperanto project, Ekparoli” <esperanto@Education.monash.edu.au>, <EHRMANT@de.ibm.com>, “Edmund GRIMLEY EVANS” <edmundo@rano.demon.co.uk>, “Don HARLOW” <don@donh.vip.best.com>, “Dirceu & Claŭdio” <claudirc@unisys.com.br>, “Cielismo Von (Wang Tianyi)” <komerco@esperanto.nu>, “Camelia Pop” <c.pop@btr.ro>, “Burgos-Sanĉez” <esperanto@neunet.com.ar>, “Bruno Masala” <bruno@poetic.com>, “Bojan Stanojevic” <bojandst@eunet.yu>, <BahaaELigo@aol.com>, “amikeca reto” <a.reto@france-association.com>, “Alain Fagot” <A.Fagot@francemel.com>, “Jesuo de las Heras” <jesuo@distrito.com>
Subject: 41
Date: Tue, 4 May 1999 17:19:54 +0200 X-MSMail-Priority: Normal
X-Mailer: Microsoft Outlook Express 4.72.3110.1
X-MimeOLE: Produced By Microsoft MimeOLE V4.72.3110.3

## Niŝ, la 04an de majo 1999, 16:20 h

Dum du tagojn ni entute ne havis elektron. La plej nova atakcelo estas elektraj instalaĵoj. Tuta Serbio restis sen elektra energio. La elektra situacio ankoraŭ ne stabilas kaj mi rapidas por sendi le mesaĝojn kiujn mi pretiĝis antaŭ ol la ‘malapero’ de elektr-energio.

Venontfoje mi skribos pli. Nun mi nur aldonas ke mi tute ne kredas je demokratio kiu uzas bombojn kaj rakedojn kiel argumentoj. Ke ne temas pri veraj demokratuloj jen ankoraŭ unu ekzemplo. Oni

provis detrui ŝtatan TV-entreprenon (RTS) ĉar ĝi 'mensogas'. La atakoj damaĝis RTS-konstruaĵon kaj mortigis plurdekon da ĵurnalistoj sed la elsendoj daŭrigis. Plej suferis tute senkulpaj ĵurnalistoj. Eĉ se ĉi estus vero (la vero fakte estas ke RTS 'nur', kelkfoje, ne donas plenan informon kaj foje iom troigas la sukcesojn, ĉu politikaj,ĉu ekonomiaj. Sed ĝuste 'demokratiaj' informiloj kelkfoje uzis elpensitajn informojn) detruado ne estas solvo. Unue: demokratia principo estas ke ĉiu havas rajton je sia propra opinio kaj vidpunkto; kaj due: do, se al mi ne plaĉus inform-maniero de iu inform-entrepeno, ĉu mi rajtus ataki ĝin per bomboj?! Al mi mem la informado je RTS tute ne plaĉas ĝuste pro la troigado. Tamen ĝis nun mi neniam ekpensis ke mi ataku ĝin. Mi simple ŝanĝas la kanalon...

Ankaoraŭ io. La protestoj de serboj en Jugoslavio kaj en la mondo, kune kun aliaj pacemaj kaj kontraŭ militaj movadoj ne signifas nepre la suporton al la politiko de Miloŝevic. Multaj serboj (granda plimulto) tute ne konsentas kun ajna perforta forigo de ajna nacieco - ja eĉ serboj mem (kiuj vivis tie) estis perforte forigitaj de kelkaj eksjugoslaviaj teritorioj, ankaŭ de Kosovo - fare de kosov-albanaj ekstremuloj pli frue - vi verŝajne ne sciis ĉi. Nome kosov-albanaj ekstremuloj aktivas tie delonge... ne nur serboj suferis. Krom aliaj naciecoj, ankaŭ albana loĝantaro estis atakata - ĉiuj kiuj ne pretis akcepti ilian ekstreman politikon... Do, homoj protestas kontraŭ NATO-atako kiu vere danĝerigas pacon je tuta mondo. La NATO-estroj simple decidis ke serboj kulpas kaj tial ili havas rajton okupi la teritorion kaj tutan ŝtaton. Se oni ne akceptas okupon NATO bombados la civitanojn ĝis la ŝtatestroj permesos eniron de NATO-fortoj en Serbio. Poste NATO-estroj rajtus fari samon ie ajn je la mondo, kaj io ajn.... Do, se vi ne akceptas trinki "Koka-kola" vi estas 'nedemokratia' kaj oni havos rajton ataki vian ŝtaton. La ekzemplo estas iom tro banala, sed la pura vero estas tre proksime. Ĉu vi vere kredas ke NATO-militaj estroj entute tiom zorgas pri veraj homaj rajtoj de iu ajn popolo kaj nacio? Mi dubas. Se mi aŭskultus nur NATO-eldiroj kaj paroladoj ja la tuta mondo devus esti feliĉego sub komando kaj protekto de NATO-alianco kaj NATO-estroj. 'Bedaŭrinde' mi juĝas pri la situacio ankaŭ laŭ NATO-agadoj. Ne nur je Jugoslavio...

## Niŝ, la 07an de majo 1999, 20:15 h

Ja, bone mi supozis ke en Niŝ estos multe pli "interese" (danĝere) se la NATO-fortoj ekuzos ankaŭ bulgarian ĉielon. Marde ĉi semajne, dank' al la dekstrula plimulto en la bulgara parlamento, NATO ricevis ankaŭ la oficialan permeson por la traflugoj. De tiam ĉiunokte io okazadis ĉi tie. Marde nokte nur unu rapidega traflugo super Niŝ, ie estis elĵetitaj du rakedoj, kaj tuja forflugo de la aviadilo. Plej verŝajne je la aerodromo. Merkrede nokte nova rapida traflugo de kelkaj aviadiloj, elĵetitaj rakedoj kaj bomboj (6-7) je petrol-rezervujoj kaj tuja forflugo. Feliĉe ke la rezervujoj jam estis malplenaj... Kelkaj uj(eg)oj estas plene detruitaj. La fenestroj je proksimaj loĝkonstruaĵoj estis detruitaj ankaŭ. Ĉu pro tio ke la defend-pafado silentis, ĉu pro tio ke tiel estis planite - ĵaŭde, t.e. vendrede frumatene, do ĉi matene, aperis pluraj aviadioj super Niŝ. Ĉirkaŭ la 03a horo vekis min la bruado. Bone mi aŭdis la aviadil-motorojn. Mi atendis iom por ekscii (ekaŭdi) ĉu denove celo estos Niŝ aŭ ili daŭros. Je la unua momento mi ekpensis ke ĉio rapide finiĝos. Sed baldaŭ mi rimarkis ke la motor-bruado restas super la urbo. Ŝajnis ke ili restos. Nun mi atentis kie estos la bomb-celo. (La rulkurteno estis mallevigita, la fenestro malfermita, ekstere kaj do sekve ankaŭ en la ĉambro estis iom tro freŝe por mia 'gusto'. Mi tute ne emis ellitiĝi, anstataŭe mi plibone enŝoviĝis je la varma kovrilo kaj komencis sekvi (aŭskulti) la okazaĵojn.) Nek la supozo ke ili restos 'nur' dudekon da minutoj estis ĝusta. (Se mi ĉi sciis mi verŝajne forirus al la tegmento. De supre

oni tamen povas ion vidi. Aparte nun kiam la oriento estas la ĉefa 'enirejo' por Niŝ. Unu el la antaŭaj noktoj mi elkovris ĉi. Almenaŭ pli multe da steloj... aparte se la tuta urbo ne havas elektrikon. Krome, la tutan orientan parton de la ĉielo kaj ĉio je kaj super la orienta parto de la urbo kaj ekster de urbo (je tiu flanko troviĝas nur 1-2 etaĝaj konstruaĵoj). Do, mi restis en la lito. Nur la motor-bruado estis aŭdebla. Dum 10-15 minutojn nenio okazadis. Aspektis kiel ke la aviadiloj esploradis kiel maniere kaj de kie ekataku. Ja ili jam, plejverŝajne ĝuste sciis kion ili devas ataki. Nur ni malsupre scias nenion. (La rakedoj kaj bomboj poste montras la celojn...) La aviadiloj komencis malleviĝadi. La atako komencas. Post iom da tempo ekpafegis la defend-armiloj. Ja tio estis surprizo kaj por mi kaj por la pilotoj. Vere surpriza atako estis. Ne nur ke ili atendis ke la aviadiloj alproksimiĝu al la celo sed la defenduloj je la sama momento ekpafadis de ĉiuj flankoj. Ja mi povis bone aŭdi la pafadon de iu proksima monto, por ili mi jam sciis - kelkfoje ili jam pafadis de tie. Sed nun je la sama momento oni povis aŭdi la pafadon de diversaj ĉirkaŭurbaj lokoj. La aviadiloj tuj leviĝis. Post la unua surprizo ili faris cirklon ('kolektis novan kuraĝon') kaj komencis novan malleviĝon. Ĉi foje ili ne malleviĝis tiom kiom ili planis, do verŝajne okazos novaj 'krom-damaĝoj'. La eksplodoj ekaŭdiĝis. La defendpafado ekpafegis. La aviadiloj ekleviĝis, faris cirklon (super la orienta parto, t.e super mi) kaj denove revenis. Denove malleviĝado.... Kaj tiel ili "ludadis" ĝis la 04:30 horoj. Ja vera aerbatalo okazadis.

Dum la tago oni povis ekscii pri la rezultoj de la "ludo". Estis denove atakitaj la aerodromo kaj petrol-rezervujoj. Entute 26 rakedoj falis. Krom-damaĝoj: proksime de la aerodromo troviĝas vilaĝo Medoŝevac. Du-tri rakedoj falis en la vilaĝo. Pluraj domoj estas plene kaj parte detruitaj. Damaĝo estas granda. Homoj perdis ĉion. Dekon da vunditaj. Du NATO-aviadiloj trafitaj. Pri la aviadiloj oni informis nenion.

Dum la tago, ĉirkaŭ 10-11 horoj nova atako al Niŝ. Mi estis en la vendejo (troviĝanta je 30 metrojn de mia domo, do je la orienta urboparto). La aviadilojn mi aŭdis, post iom da tempo ankaŭ eksplodojn. (Estis nuba ĉielo, nenion mi povis vidi...) Aperis nigra densa flumo. Poste mi eksciis kaj vidis la rezultojn je TV-elsendoj de niŝaj tv-entreprenoj. Estis trafitaj la urba hospitalo (kelkaj hospital-konstruaĵoj estas damaĝitaj: por infanaj malsanoj kaj la naskiĝejo...) kaj kelkaj stratetoj apud centrala merkato. Dekon da mortigitaj, kvindekon da vunditaj... Mi unue pensis ke okazis novaj eraroj.... Sed ŝajnas ke ĉi foje vere ne estis krom-damaĝo jam intenco! Nome se oni deziris detrŭi la proksiman ponton, se temas pri la merkato, oni ja uzus potencaj bomboj. Anstataŭe je la atakoj estis uzitaj tiuj malpermesitaj, kontraŭ homaj bomboj (je unu granda bombo troviĝas multaj malgrandaj bomboj kaj tre akraj kaj tre danĝeraj metaleroj kiuj estas dediĉitaj ĵus por vundigi kaj mortigi la homojn). Ŝajnas ke ĉi atakoj estis kontraŭhomaj.

Oni ĵus anoncis danĝeron de la aeratako en Beogrado. La elektriko du foje malfortiĝis.... eble mi tuj finu.... Ĵus anonciĝas sirenoj ankaŭ en Niŝ. Espereble la atako ne okazos tuj kaj la elektriko ne malaperos...

...do, aspektas ke la atakoj estis revenĝo por la lastnokta defendpafado... Je ĉiu okazo nun vere okazis 'pura' atako al la civilaj celoj. Estas mortigitaj civitanoj je la urbocentra parto de Niŝ. Bomboj falis proksime de la merkato kaj al la hospital-konstruaĵoj. Tiuj 'apudmerkataj' bomboj falis je nur 80-100 metrojn de la trinkvendejo kie ankaŭ mi laboras. (Nia entrepreno havas du vendejojn: mia ĉefa laborloko fakte estas tiu 'merkata' vendejo. Sed momente, jam dum unu monato, mi 'helpas' je tiu alia 'orientparta' vendejo.) La vendejon kaj la kolegon mi povis rimarki je tv-elsendoj dum oni raportis pri la damaĝoj kaj pri la mortigitaj homoj. Dum la tago mi telefonis al li. Li diris:"Ja estis terura frapo

kaj eksplodo!" Feliĉe nenio okazis kun li. Bedaŭrinde ne ĉiuj havis feliĉon hodiaŭ...

Postmorgaŭ estos Venko Tago, la 9an de majo. Ĉu ankaŭ ĉi tie la detruado finiĝos ĝis tiam ni ekscios. Ŝajnas ke la politika solvo proksimiĝas, tial usona administracio rapidas detrui ju pli multe....

La aviadiloj ekbrŭas...

## Niŝ, la 08an de majo 1999, 07:20 h

Tiuj vesperaj aviadiloj kaj postaj kiujn mi aŭdis nur traflugis Niŝ. Tamen, por ĉiu okazo mi preferas malŝaltigi la komputilon, alie mi riskas eblan komputil-damaĝon... Ĉi nokte ĉi tie estis trankvile. Paracin, urbo je 70-80 km norde de Niŝ, estis atakita. Fakte la bomboj estis ĵetitaj ĉirkaŭ la urbo. Ĉi nokte estis atakita Beogrado. La atako komencis kun nova detrŭado de la elektraj instalaĵoj (ja tiuj du elektraj malfortigoj hieraŭ vespere, dum mi skribis...) La tuta Beogrado restis sen elektrika energio. (ĉ. la 23a horo telefonis al mi Renato el Beogrado. Li interesiĝis pri kio okazis en Niŝ. Dum la interparolo mi eksciis ke Beogrado ne havas elektrikon.) Poste dum la nokto NATO-aviadiloj 'frapis' kelkajn ministeriajn konstruaĵojn (ja nenio nova - ĉi jam estis proklamita por militaj celoj de NATO-uloj) kaj...novaj celoj ?... Hotelo Jugoslavio kaj ĉina ambasadejo! Tamen en Niŝ okazis intenca atako je civilaj celoj. Ĉi plej novaj atak-celoj en Beogrado konfirmas mian supozon. Ĉu NATOuloj denove nenion scias?! Ja tio estas ilia kutima maniero. Se okazas io kio ne taŭgas por la publika opinio ili ĉiuj unue diradas ke la informo ne ĝustas. Post iom da tempo ili klarigas ke oni scias nenion (interese sonas ĉi klarigo: la NATO-bazo, kiu fakte donas la komandojn scias nenion pri la atakitaj celoj...), Poste ili 'akceptas eblecon ke io tia okazis' sed ili ne havas detalojn. Kiam ili fine kolektas ĉiujn detalojn ili nur pardonpetas por la krom-damaĝoj kaj eblaj eraroj... Mi tre interesiĝas kiel finiĝos nuna afero kun la ambasado. Ĝis nun: du personoj estis mortigitaj kaj kelkaj vunditaj je tiu ambasad-atako. La kunsido de UN konsilio por sekurecoĵus komencis. /Foje dum 'krizo' kun arestitaj 3 (TRI) usonaj militistoj la usona administracio tre zorgis por ili sorto. Iu el la administraciuloj eĉ eldiris ke "Miloŝevic devus estimi la ĵenevan Interkonsenton...". La ĵeneva kaj aliaj Interkonsentoj ankaŭ antaŭvidas neatakado de ambasadejoj... Mi ŝatus denove aŭdi tiun administraciulon kion li nun eldirus.../

Mi tre malĝojas ke la redakcio de "Libera Eŭropo" radio-elsendoj perdis sendependecon. Nun kiam komencis tre intensivaj interkonsentadoj por trovi la politikajn kaj pacajn solvojn perdiĝis tiu vera 'duflankeco' je la raportado. La redaktoroj nun serĉas nur tiujn homojn en Serbio kiuj pravigas la bombadon de Jugoslavio kaj kiuj simple ripetas tiujn usonaj-NATOajn vidpunktojn por solvo de la krizo "Atako de NATO al Jugoslavio".

La plej nova informo, kion 'demokratiaj' informiloj eble ne mencios, apud Lipljan, kosova loko, oni ĉi matene trovis la kadavron de s-ro Agani, albano, la plej proksima kunlaboranto de Ibrahim Rugova. La kvereloj inter alban-kosovaj politikistoj daŭras. La problemo estas ke Ibrahim Rugova estas pli pacema ol la estroj de "Liberigita armeo de Kosovo" kiuj batalas nur por plene okupi Kosovo kaj forpreni ĝin de Serbio. Ĝuste por ĉi al NATO-estroj multe pli taŭgis la estroj de tiuj "Liberigita armeo" - nur kun ili NATOuloj povis komenci la atakojn al Jugoslavio.

Eĉ ĉi atako al la ĉina ambasadejo estas konfirmo ke al la NATO tute ne plaĉas solvo ke UN-fortoj venu al Kosovo. Ja ilia plej baza kaj plej grava celo estis ke nur NATO venu je Kosovo kaj ke ĝi estru tie. Pro tio oni daŭre diradas ke la atakado ne haltos ĉar jugoslaviaj ŝtatestroj ne plenigis nek unu NATO postulo. Ja estas demando kial entute la estroj de ajna ŝtato, krom tiuj kiuj jam membras je NATO kompreneble, devus plenigi ajna postulo de NATO-alianco! Tamen, el tiuj kvin postuloj, kvar jam estas akceptitaj! Sed NATOuloj ne

deziras scii por ĉi. La kvina postulo estas ke je Kosovo venu NATO-fortoj. Jugoslaviaj estroj bonvenigas nur UN-fortoj. Mi ĵus rememoris pri unu demando sstarigita de la ĵurnalistino de "Libera Eŭropo" al unu kunparolanto: "Kial al la jugoslaviaj ŝtatestroj ne taŭgas NATO-fortoj, jam ili insistas nur je UN-fortoj?".

## 14:15 h

Ĉi matene mi ne sukcesis sendi la mesaĝojn. Foje mi sukcesos.

Beogrado ne havas elektrikon (Eunet-sistemo), en Niŝ la telefonlinio kun Cent-sistemo ankoraŭ ne funkcias. La sidejo de Cent-sistemo estas je konstruaĵo de niŝa universitato. La 'merkataj' bomboj preskaŭ trafis la universitaton, mankis nur ĉ. 200 metrojn. La konstruaĵo troviĝas je unu flanko/fino de la strato kiu estis rekte trafita hieraŭ. Je alia flanko/fino de la strato troviĝas la trinkvendejo.

Kvar vunditaj personoj mortis. Entute 15 mortigitaj je hieraŭa atako. Hodiaŭ estas Funebra Tago en Niŝ.

Okaze de la ambasadej-atako en Beogrado NATO jam "akceptis eblecon ke okazis ia eraro...". Ja tre 'interesa' estas tiu eraro: la konstruaĵo de la ambasadejo estas trafita per kelkaj rakedoj de tri diversaj flankoj. Ĝis nun: 4 mortigitaj, inter ili unu ĉina ĵurnalisto, kaj dekon da vunditaj. "Pura hazardo", kiel la NATOuloj diras...

La aer-ataka danĝero daŭras. Nenian bruon ankoraŭ aŭdeblas. Se okazos io 'nova', mi informos vin.

He, ĵus mi aŭdis informon pri UN-kunsido de la Sekureca konsilio. Je la fina konkludo ne nur ke oni diris ion kontraŭ NATO-agado, eĉ oni povus ekpensi ke fakte Ĉinio estas mem kulpa pro la atako?! Ja kial la ambasadejo troviĝas tie kie falas la bomboj....

Eble mi tamen atentu ke mi ne donadu multajn informojn, aparte ne tiuj kiuj ne taŭgas por la 'NATO-demokratio'. En unu germana ĵurnalo oni menciis ankaŭ eblecon ke oni forigu Jugoslavion el interreto?! Ja la jugoslaviaj uzantoj tro ŝarĝigas la inter-reton kaj tio tre ĝenas al aliaj uzantoj. Jen unu 'homrajta/demokratia' kaŭzo (ja ili zorgegas pri rajtoj de aliaj) pro kiu oni pretas malpermesi uzadon de interreton al la jugoslavianoj. Sed la plej baza zorgo fakte estas ke la mesaĝoj el Jugoslavio ne 'taŭgas' al la NATO-celoj. Ĉi mi aŭdis je intervjuo je "Libera Eŭropo". La ĵurnalistino demandis la kunparolanton pri lia opinio pri ĉi ebleco. Estis la sama intervjuo je kiu la ĵurnalistino faris tiun 'saĝan' demandon ja kia diferenco estas inter NATO kaj UN-fortoj. Laŭ la maniero kiel ŝi starigis la demandon mi povis konkludi ke ŝi fakte miras ke entute estas ia diferenco inter tiuj du 'instancoj'. Mi ĵus rememoris, ŝi interparolis kun unu serbia ĵurnalisto kiu laboras en unu sendependa/neŝtata gazeto. La demando pri 'eventualaj diferencoj' ankaŭ lin iom konfuzigis.

## El suna kaj momente senbomba Niŝ. 46 vespere: 22:40 h

Sufiĉe aktiva tago estis hodiaŭ. Espereble oni tamen iom ripozos ĉi nokte.

Je la 16:05 nova atako al Niŝ. Ŝajnas ke fine venis vico por detruadi Niŝ-on. La atako daŭris dudekon da minutoj. Ĉefa atakcelo estis unu el la urbaj pontoj. La ponto estas damaĝita. Do, plej verŝajne la NATO-aviadiloj revenos por plene detrui la ponton. Nur se oni intertempe subite ne decidos ĉesigi la bombadon... Krom-domaĝoj: ĉiuj proksimaj fenestroj rompigitaj, unu malnova dometo detruita, unu urba buso damaĝita, unu el la konstruaĵoj de entrepreno Rudo detruita - kelkaj laboristoj vunditaj, je 7 metrojn de tiu konstruaĵo troviĝas greklanda konsulejo - la konstruaĵo damaĝita, du konsulaj aŭtoj damaĝitaj kaj unu aŭ du konsul-laboristoj vunditaj.

La aviadiloj revenas!! Do sekvos novaj atakoj...

La konsultejo kaj la ponto troviĝas je 100 metrojn de la 'merkata' vendejo. He, fine oni tamen trafos la vendejon... Ĉie ĉirkaŭ oni jam ĵetis bombojn. Fakte se oni detruos ĉiujn niŝajn pontojn ni ne povos atingi la vendejon...

Ĝis venonta mesaĝo, sinceran saluton el Niŝ super kiu la aviadiloj nuntempe nur traflugadas,

*Zoran*

## Niŝ, la 14an de majo 1999, 13:50 h

Ŝajnas ke ankaŭ ĉi nokte okazis ia atako. Oni parolas ke oni denove uzis tiujn 'kontraŭ-elektrikajn' bombojn. Mi aŭdis nenion. Mi dormis. Je la 7a matene elektriko 'malaperis'. Je la 13a elktriko aperis. Du antaŭajn tagojn mi ne havis elektrikan energion.

Ĉio ĉi jam komencas esti tede al mi. La politikistoj interkonsentadas kaj ĉiuj estas kontraŭ la bombardo kaj por tuja haltigo de la bombardo, la usona prezidanto daŭre parolegas pri la "kvin neplenigitaj kondiĉoj", NATO-fortoj daŭre bombardas kaj detruas, ĉi tie oni informas pri novaj damaĝoj kaj viktimoj... Ja, preskaŭ nenio novas...ĝenerale.

Praktike...antaŭ du tagoj, por la unua fojo estis atakita ankaŭ la orienta parto de Niŝ. Unu el la bomboj trafis ankaŭ mian straton. Plej suferis la loĝ-parto kiu situas je 1-2 km oriente-sudoriente de mia domo. Kelkaj el tiuj 'kontraŭ-homaj' bomboj falis tie. La domoj (2) kiuj estis rekte trafitaj estis parte detruitaj. Fakte tiuj 'kontraŭ-homaj' bomboj ne estas tiel danĝeraj (fortaj) por konstruaĵoj. Ili detruas konstruaĵoj nur je rekta falo sur konstruaĵo, alie 'nur' damaĝas murojn kaj rompiĝas la fenestraj vitroj. Sed por la homoj kiuj troviĝas proksime la bomboj estas tre danĝeraj. La eksplodo de tiuj bomboj 'liberiĝas' amason de metaleretoj, tre akraj... Tute ne bonas se iu el tiuj eretoj trafas vin... Mortigoj facilas...

La aviadiloj aperis supre. Oni povas aŭdi iliajn motorojn. Mi nur esperas ke elektriko ne malaperos...

Feliĉe ĉi foje, du tagoj antaŭe, nur kelkaj personoj estas vunditaj kaj kelkaj aŭtoj detruitaj. Tiu bombo kiu trafis mian straton falis en la korto, inter du domoj, je 600 m de mia domo. Ĝi plene detruis unu aŭton kaj vundis unu trapasanton...proksimaj vitroj rompiĝis... En la momento de la atako mi estis en la vendejo. Mi vidis nenion. Ĉio okazadis je tute mala direkto... Se mi elirus surstrate eble ja mi povus vidi... sed tioma scivolemulo ja mi ne estis... Krome mi ja sentis ke la afero povus esti pli serioza... Ja estis proksime... La atako komencis kun la regula flugado super la urbo...kiu ĵus nun ankaŭ okazadas... ja la aviadiloj daŭre flugas supre.. kaj de tempo al tempo mi aŭdas iajn eksplodojn, sed sufiĉe malproksimajn..., ...en unu momento ekbruis la defend-pafado. La aviadiloj malleviĝis. La eksplodoj ekis. Iom poste oni povis aŭdi ke du-tri aviadiloj flugis sufiĉe malalte...kaj ili ĝuste elĵetis la bombojn (ju pli malalte ili flugas, des pli precizaj ili estas). Mi aŭdis tri sufiĉe fortajn eksplodojn. Mi tute ne emis supozadi kie ĝuste falis la bombojn. Post 20-30 minutoj la aviadiloj forflugis. Ekstere mi rimarkis ian eksciitecon. Mi elliris la vendejo. La homoj montradis ion kaj rigardis ion je orienta direkto. Mi proksimiĝis al la strato kaj ankaŭ mi ekrigardis je tiu direkto. Mia domo troviĝas ĝuste ĉe mala flanko de la strato, kaj malantaŭ de ĝi oni povis vidi tri densajn nigrajn fumajn fostojn... Poste ni eksciis ke 'temis' pri du aŭtoj kaj unu domo je ĉ. 1 km for... Io okazadis ankaŭ je mia strato. Mi ne povis malproksimiĝi de la vendejo kaj mi restis tie kie mi estis. Sed tie, je ĉ. 600 m, homoj kolektiĝis... Io ja okazis. Kiam ankaŭ kuracistaj veturiloj rapide venis mi certis ke io okazis... Poste mi eksciis pri tiu bombo kiu trafis la aŭton kaj vundis unu trapasanton. Venis ankaŭ policistoj. Ili tuj fermis tutan straton kaj kiam la kuracistoj finis la laboron la policistoj kaj armeanoj komencis purigi la ĉirkaŭaĵon de

neeksploditaj bombetoj. Dum la tuta posttagmezo kaj vespero ni aŭdadis eksplodojn... (Ankoraŭ unu karakterizo de tiuj 'kontraŭ-homaj' bomboj: ili konsistas ankaŭ de multaj (100-200) bombetoj (same danĝeraj -malgraŭ la malgrandecon) kiuj ne ĉiuj tuj eksplodas)

Ĉi tiel pasis la milita 'baptigo' de la orienta parto de Niŝ. Nun ankaŭ la loĝantoj de la orienta urboparto povas diri ke ankaŭ ili esti bombarditaj... kvankam ni povus sufiĉe bone vivi ankaŭ sen ĉi sperto...

Je radio-novaĵoj, kiuj ĵus komencis, plej ĉefa novaĵo estas ke dum la nokto ĉe unu kosova vilaĝo, proksime de urbo Prizren, okazis atako je vilaĝanoj - ĉefe albanoj. Plej verŝajne la NATO-pilotoj pensis ke tio estis armeaj-fortoj... Estas mortigitaj pli ol 60 da personoj, ĉ. 80 vunditaj, la atako daŭris ĉ. tri horojn per tiuj kontraŭ-homaj bomboj....

## Niŝ, la 16an de majo 1999, 03:20 h

### *Ja ĝuste: 03:20 frumatene!*

La problemoj estas 'fantaziemaj'. Ĵus pro ĉi la problemoj foje estas eĉ interesaj por mi. La plej nova 'elpensaĵo', kiu daŭras jam plurajn tagojn, estas manko de elektrika energio. Feliĉe ke ankaŭ mi 'buntas je ideoj' kaj mi daŭre sukcesas relative facile solvi novajn problemojn, eĉ per vere simplaj solvoj. Por ĉi 'elektrika' problemo la plej bona solvo estas uzi elektrikon kiam ĝi 'fluas'... (Saĝe, ĉu ne?) Momente la elektrika sistemo funkcias kaj mi uzas la okazon...

Ŝajnas ke denove funkcias nur la rezerva elektrika sistemo. Ankaŭ ĉi nokte oni uzis 'kontraŭ elektraj' bomboj.

Mia urboparto troviĝas 'survoje' de tiu rezerva sistemo kaj ĝis mateno (ĉ. la 7a h) mi certe havos la elektrikon. Tiam venas la laboristoj de la elektro-administrado kiu plej verŝajne unue 'prizorgos' plibezonatajn organizoj kaj institucioj. Se estos sufiĉe da elektrikon, la urboparto ne perdos la elektrikon. Alie, oni devos atendi ĝis plena stabiligo de la elektro-sistemo, kiu daŭros kelkajn horojn. Tiom da tempo oni ĝenerale bezonas por purigi la 'elektro-vojoj' de tiuj 'anti-elektrikaj' bomboj.

Pro la elektro-manko mi enlitiĝis jam je la 20a horo.

La aer-ataka ebleco estis anoncita. Malgraŭ mia optimisteco mi nun tamen 'estimas' la danĝer-anoncado. Ja Niŝ plu ne estas tiel sekura... aliel mi plej verŝajne promenus tra la urbo. (Kutime, je normalaj, elektrikaj kaj aliaj, kondiĉoj mi kutime enlitiĝas ĉ. la 1a horo, se mi havas tempon...) Mi jam kelkfoje promenis tra plene mallumigita (senelektrika) urbo. Eĉ sen poŝ-lampeto... Estis interese. Tiuj kiuj havis okazon foje ie vidi la bildkartojn kiuj montras iun urbon "dum nokto" povas imagi la aspekton. Vere oni nenion povas vidi dum la nokto!!! Ĉio nigras... Dum tiuj miaj noktaj promenoj mi uzis fakte la lumon de la trapasantaj veturiloj. Sen ajna lumo ja estus eĉ danĝere. Neniu scias de kie povus aperi ia nova truo je la trotuaro... ankaŭ se vi tro rapidus tre facile oni povas malkovri plej diversajn 'nevideblajn' aĵojn kaj homojn... Ĉi lastajn mi ankoraŭ ne spertis... mi ne rapidis tro...mi promenadis. Sen elektriko oni ne havas kialon por ie rapidi. Eĉ tempo ne rapidas kiam mankas la elektriko...

Ĉirkaŭ la 1a horo mi vekiĝis. Ne pro la ajna bruo. Mi simple vekiĝis (ja kutime mi dormas ĉ. 5-6 horoj [de la 1a ĝis la 6a-7a matene, depende de la tag-devoj...]). Ke elektriko intertempe 'venis' mi tuj rimarkis, la radio-horloĝaj numeroj trembrilis. Dum mi jam planadis kion fari mi ŝaltigis la radion (kelkajn noktojn mi tute ne povis aŭskulti ajnan radio-elsendon, pro la elektriko-manko) kaj 'ordigis la horloĝon. La 'noktaj' planoj jam estis finitaj sed mi ankoraŭ pensadis kiom multe mi povas kredi je tiu 'nokta' elektriko. Dum mi 'kalkuladis' ekstere mi rimarkis ian ekbrilegon. Ĉar pluvas mi ekpensis ke ia fulmo okazis. Sed nenian bruon okazis. Samtempe mi rimarkis ke la

radio-horloĝaj numeroj denove trembrilas. Do, dum la momento okazis ankaŭ la ‘elektro-ĉeso’. Mi jam ekpensis pri la ‘kontraŭ-elektraj’ bomboj kiam ekstere okazis nova ekbrilego. Je la sama momento la elektriko ‘malaperis’... Nun mi certis ke temis pri la bomboj. Sed ajnan bruon mi povis aŭdi. Ja mi plene komprenis kiel mi ne vekiĝis kiam lastfoje oni ‘forigis’ la elektrikon antaŭ, jam, tri tagoj... Kaj nun mi uzas la rezervan elektro-sistemon por priskribi ĉion ĉi.

Ankaŭ je radio-novaĵoj preskaŭ nenio novas. “RTS” informas pri tiu lasta plurnombra mortigo de la civiloj (ĝis nun oni trovis 79 bruligitajn kadavrojn - estis uzita iuj bruligaj ‘kontraŭ-homaj’ bomboj. La bomboj faras altan temperaturon per kiu ili mortigas la homojn) kaj pri novaj atakoj je diversaj lokoj kaj urboj. “Libera Europo” elsendas: ‘novaj’ nesciecojn de NATO-komando en Bruselo; intervjuoj kun la estroj de serbiaj opoziciaj politikaj partioj - kiuj vojaĝadas tra EU; ne mankas ankaŭ la diversaj ‘spertuloj’ pri la ‘balkana demando’ kaj iliaj konsiloj kiel solvi krizon; ‘impresoj’ de albanaj rifuĝintoj estas nepraj, aparte se oni trovas iun ‘kompetetulon’ - ĉi foje estis unu albana profesoro kiu ankaŭ forlasis Priŝtina... “La voĉo de Usono” mi tute ne emis serĉi... Se mi aŭskultus nur “Libera Europo” ja eĉ mi devus esti por daŭra bombardo, detruado kaj mortigo... Se oni daŭre dubas pri daŭrigo de la milito: la ĵurnalistino je la fino aldonis la novaĵon ke brita armeo pretigis novajn kelkajn milojn da paraŝutaj fortoj kiuj lokiĝos je Korzika; je intervjuo kun unu el usonaj balkanaj spertuloj ŝi denove interesiĝis ĉu vere nur per bombardo oni povas ion fari kaj ĉu vere oni ne planas ankaŭ surteraj atakoj...La ‘spertulo’ respondis ke je komenco la politikistoj ne sciis ke la publika opinio ne estos kontraŭ militaj viktimoj...; brita funkciulo Tony B. vizitis Bulgarion....

Ja, multon ‘interesan’ oni povas ekscii...

Je ĉiu okazo la rifuĝintoj el Kosovo plej multe suferas. Mi tre dubas ĉu la ĵurnalistino entute povas vere kompreni la sorton kaj vivon de la rifuĝintoj. Por ŝi la plej granda helpo estas ke ŝi nur tralegu la preparitan tekston kaj ‘lerte’ gvidu la interkonsentojn... Ĉu ŝi donis almenaŭ parton de la salajro por iom pli praktike helpi la suferantojn? Facilas paroli....

En Niŝ daŭre trankvilas. Ŝajnas ke ankoraŭ unu nokto ni ‘ripozos’...

La 22an de majo, je la 22a horo, okazis nova aer-atako al la elektro-instalaĵoj apud Niŝ. Tuta urbo restis en mallumo. Je tiu atako oni uzis ordinaraj bomboj. La atakoj al la elektikaj instalaĵoj komencis antaŭ tri semajnoj. De tiam la elektrika situacio ĉi tie ne stabilas. Je la komenco oni uzis tiuj ‘kontraŭ-elektrikaj’ bomboj (grafitaj retoj) kiuj ‘nur’ kaŭzis la ‘elektrikan ŝokon’ je alt-tensiaj elektirikaĵoj. Por reordigi la sistemon post tiaj atakoj oni kutime bezonis po kelkajn horojn. Sed ‘ordinaraj’ bomboj plene detruas la instalaĵoj. Por denove konstrui ĉion oni bezonas plurajn tagojn, monatojn, eĉ jarojn... La atako ne estis tiel sukcesa, la instalaĵoj estis ‘nur’ parte damaĝitaj... kaj ni ‘jam’ havas elektrikon. Sed ĉi ankoraŭ tute ne signifas ke novaj atakoj ne okazos Iuj urbopartoj ‘jam’ hieraŭ ricevis denove elektrikon. Mia urboparto nur hodiaŭ...

## 26-05-99, 05:40 h

Laŭ mia radio-horloĝo la elektriko ‘aperis’ antaŭ ĉ. 3 horojn. Mi ĵus vekiĝis. Ŝajnas ke oni tamen komencis la ‘planatan’ malŝaltigon... Almenaŭ ĝis oni plene ne detruos tiun apudan elektrik-centran instalaĵon... Je tiu okazo ni devos atendi la plenan rekonstruadon kaj tio tamen daŭros ‘iom’ pli ol ‘nur’ kelkaj tagoj...

## 26-05-99, 14:50 h

Planita aŭ ne planita, je ĉiu okazo mi plu ne havas elektrikon ol mi havas ĝin. Ĉi matene mi ‘ĝuis’ ĝin nur dum dekon da

minutoj... Nun mi rapidas almenaŭ fini mesaĝon... por la sendado mi vidos...

Do, momente iel-tiel ni havos po iom elektrikon. Ja NATO-uloj sufiĉe bone elektas la bomb-celojn. La armeo nek ĉi tiel multe suferos. Ĝi plej verŝajne havas siajn proprajn, sendependajn, energo-fontoj. Sed ordinaraj civitanoj, aparte en la urboj, plej multe estas trafitaj per ĉi elektrik-manko. Ne temas nur pri tio ke ni nun ekz. ne povas uzi elektrikajn lampojn, TV, radio-aparatojn, fridujojn (la nutraĵo damaĝiĝas...), komputilojn... Ĉi rekte trafas unuopulojn. Manko de elektriko tre ĝenas al la industrio. La civitanoj plej 'praktike' ĉi rimarkas je pano-manko. Nome la pano-'fabriko' "Ĵitopek" (la plej granda en Niŝ) ankaŭ bezonas elektrikon por la produktado. Ĉar la elektriko mankas oni ne povas pretigi bezonatajn kvantojn da pano. La rezulto: aperis vicojn por pano. Oni devas atendi por aĉeti panon. Pro la elektrika manko la niŝa bier-fabriko ne sukcesas produkti bieron. Ni jam sufiĉe longe ne havas niŝan bieron, plej ŝatata ĉi tie... Eĉ por biero ni havis vicojn. Nun ni (mia firmao) ordigis la aferon kun petrol-aĉetado kaj ni sukcesas iel solvi la bier-manko per zaječara biero...

He, lasttempe nur bomboj ne tiom mankas...

Lastnokte la aviadiloj denove provis bombardi Niŝ. La defendpafado estis sufiĉe forta kaj laŭ hodiaŭaj informoj la rakedoj por la elektro-instalaĵoj estis detruitaj...

Ĉi matene, je la 6a horo, oni regule anoncis ĉeson de la danĝero. Je la 8a la sirenoj denove anonciĝis... La 'danĝero' daŭras...

La urbanoj nun tamen iom pli zorgas se aviadiloj ekbruas super la urbo. Bomboj kiuj mortigis dudekon da urbanoj estis sufiĉe serioza admono. Ja la stratoj tamen ne estas tiel sekuraj.

Hieraŭ vespere mi promenis tra la malluma urbo. Ĉar la 'artefarita' lumo tute mankis mi povis ĝui je natura lumo. Estis bela lunbrilo... Tre romantike. Je tiu momento la aviadiloj ne aperis kaj ne malbeligis la 'etoson'... La aviadiloj venis pli poste, dum la nokto...

## 25-5-99. 20:31 horo

He, interese. Mia urboparto daŭre havas elektrikon. Do, mi uzas la okazon.

Ĉirkaŭ mia domo kaj la vendejo oni ja tamen multe ne rimarkas la militon. Ĉio finiĝas nur je la sirena 'muziko' kun, de tempo al tempo, aviadil-motora akompano. Foje ankaŭ bomboj 'donas bason'.

Eĉ tiu milito tute ne similas je kutimaj militoj. Tute ne ekzistas ia malamika armeo. Nur iaj avidiloj, de tempo al tempo, detruas diversaj objektoj ĉie tra la lando kaj la urbo kaj kelkfoje mortigas la trapasantojn...

Antaŭ kelkaj tagoj mi trapasis tiun trafitan ponton. Du aŭ tri rakedoj falis proksime. Unu rakedo preskaŭ rekte trafis ĝin. Tiu rakedo 'forigis' unu parton (mankas 1-2 metroj da trotuaro proksime de la maldekstra riverbordo). Je plej proksimaj domoj estas forigitaj partojn de la tegmentoj kaj la fenestro-vitrojn. La fenestrovitroj 'mankas' ankaŭ je la domoj je kelkaj apudaj stratetoj. La rakedo(j) ĉe alia (dekstra riverbordo) maltrafis la ponton. Proksime de tiu flanko de la ponto troviĝas greka konsulejo kaj malantaŭ du entreprenoj. La fenestroj je la greka konsultejo estas 'forigitaj'. Ankaŭ la konstruaĵ-muro estas sufiĉe damaĝita. Ankaŭ la vendejo de la firmao je kiu mi laboras, kiu troviĝas je 300 metroj de la ponto, je tiu 'greka' riverbordo, 'perdis' fenestr-vitroj. La pordo 'sanas'. Laborante je la vendejo mi konatiĝis kun la laboristoj de tiuj pont-proksimaj entreprenoj. Demandate unu el la 'atestantoj', kiu fakte laboris je la momento de la atako, kiel ĉio aspektis li diris ke ili nur aŭdis bruon, eksplodon kaj amaso da akvo falis sur ili. "Ni preskaŭ droniĝis!" klarigis la laboristo. Ja unu el la rakedoj trafis riveron. Pro la frapo kaj eksplodo la amaso da akvo leviĝis kaj falis ankaŭ sur la entrepreno kiu troviĝas tuj apude... "Ni estis plene malsekaj." Nur kelkaj vunditaj personoj kaj

suficê granda damaĝo. Ponton nun uzas nur piedirantoj kaj biciklantoj. Morgaŭ mi laboros je tiu alia vendejo. He, se io nova okazos mi eĉ persone povos vidi...

Foje, en tiu 'nedanĝera' vendejo eniris unu virino por aĉeti unu botelon da suko. Ĝuste je tiu momento 'ekmuzikis' la sirenoj. "Ja ili estas tro tedaj. Nek la panon mi povas aĉeti trankvile!" diris la virino. Kaj ŝi daŭris al la proksima vendejo por aĉeti ankaŭ panon.

Tagon post tiu bombardo je centra urboparto, proksime de tiu merkato kiam estis mortigitaj dekon da personoj, la vendejon eniris unu viro nigre vestita: "Mi bezonas du skatoloj da biero, du skateloj da minerala akvo kaj unu skatolo da vino. Mia onklo estis mortigita hieraŭ..." simple diris la homo.

Do, antaŭ la vendejo (tiu 'nedanĝera), la militon oni preskaŭ ne rimarkas. Nur de tempo al tempo aperas la rememoraĵoj...

La elektriko daŭras. Se oni plene ne detruos la elektrikaĵojn la sistemo iel-tiel funkcios, kvankam la 'elektro-paŭzoj' okazados...

## 26-5-99: 21:03 h

Aer-ataka danĝero daŭras. Elektriko daŭras. Aviadilojn oni ne aŭdas... Hmm, tamen oni aŭdetas... Ili nur traflugis....

La lasta nokto estis suficê brua ĉi tie. Tridekon da rakedoj falis. La ĉefa celo estis denove nordokcidenta parto de la urbo, laŭ la oficialaj informoj. Eble. Tamen la bruon oni povis aŭdi ĉie... Mi dormis. Por la momento mi vekiĝis. Ĝuste tiam okazis iu suficê forta eksplodo...ĉi foje ankaŭ mia domo suficê ekvibris... (Nun mi ja povas imagi kiel aspektas la tertremoj)... Poste sekvis kelkaj 'malfortaj'...do, nenion grave. La 'bruadon' mi iom aŭdadis kaj denove ekdormis ĉar nenion alion mi povis konkrete fari je tiu momento (krom eble fuĝi...sed mi tute ne ŝatas fuĝadi. Mi de la hundoj ne forkuras, kaj nun nek mi forkuros pro iaj aviadiloj...)

* Oni ĵus povis aŭdi je radio la 'impresojn' de la niŝano en kies dormoĉambron last-nokte 'venis' unu, 4 metrojn longa, rakedo... La rakedo ne eksplodis....

"Interesa" nokto estis. Kia estos ĉi vespera 'programo'...ni aŭdos.

Hodiaŭ mi laboris en tiu 'danĝera' vendejo. Ĝi troviĝas suficê proksime al tiu jam bombita ponto (daŭras ebleco ke la aviadiloj foje revenu por findetruu la ponton. Pro ĉi la vendejo estas 'danĝera'). Mi jam kelkfoje estis en tiu vendejo post la bombado. Hodiaŭ mi por la unuan fojon restis tie dum kelkaj horoj.

* Oni ĵus informis ke tuta Beogrado 'perdis' elektrikon...

Mi tute ne zorgis pri eblaj novaj atakoj nek mi elpensadis amason de plej diversaj aliaj danĝeroj, kiel kutime oni faras...aparte pesimistoj. Je momentoj kiam mi ne estis okupata mi rimarkadis plej diversajn, multe pli interesaj (almenaŭ por mi) aferojn. Unue kion mi rimarkis estis unu 'sirena ilo'. Fakte mi unue aŭdis ĝin. (Tre bone mi aŭdis ĝin! Tro laŭtaj la sireniloj estas.) Tiu ĉi troviĝas sur unu apud-rivera plur-etaĝa konstruaĵo....

Pri la 'impresoj' el tiu 'danĝer-vendejo' mi skribos pli venontfoje, se intertempe ne okazos io pli "interese". Nun mi jam estas 'iom' laca (t.e. dormema). Mi havis bonan laboron hodiaŭ (la tago estis relative varma kaj la bier-ŝatantoj tre soifis...) tial mi baldaŭ havos bonan dormadon...

Nun mi ja povus supozi kiel iu povas tiel firme/forte dormi ke "nek la kanonoj" povas vekigu tiun. Eble ĉi nokte mi spertiĝos ankaŭ ĉi.

* Oni ĵus informas ke la lastnokta atako al Niŝ estis plej forta. La atako komencis je la 01:40 horo kaj daŭris ĝis la fru-mateno...

Interese... Do, pro ĉi la homoj hodiaŭ paroladis ke ili dum la tuta nokto ne povis dormi. Mi pensis ke ili iom troigis...

Tamen estas pli praktike se oni dormas.

P.s: Mi ĵus rememoris. Por ĉi raportetoj novaj interesuloj el ĉiuj mond-partoj daŭre

anonciĝas. Tiuj kiuj ŝatus tralegi ankaŭ antaŭajn raportetojn povas trovi ilin ie je: www.yurope.com/org/eos/.

Sinceran saluton el Niŝ

*Zoran*

## 27-5-99: 23:10 h

Lastnokte estis bunta 'programo'! Malgraŭ la laco mi tamen ne ekdormis tuj. Mi aŭskultis meznoktajn radio-novaĵojn (je 'Radio-Televizio Serbio' oni povas ekscii kie okazadis la NATO-atakoj, je 'Libera Europo' oni povas ekscii pri la diplomatiaj kaj aliaj aktivecoj 'ĉirkaŭ' Kosovo). La 'spektaklo' komencis ĉ. 00:30 h. Unue oni povis aŭdi aviadilojn. Ili fakte ne estas tiom bruaj ĉar ili ĉiam flugas sufiĉe alte. (Pro la bruo pli suferas tiuj kiuj loĝas proksime de la aerodromoj, kie la aviadiloj komencas kaj finas siajn batalajn kaj aliajn flugojn.) Dum mi 'kalkulis' ĉu la aviadiloj 'trankvile' daŭros plu aŭ ili restos ĉi tie ... ekbruis la defend-pafado. Tio signifis ke la aviadiloj pretiĝas atakon. La defend-pafado okazas ĉefe nur kiam la aviadiloj ne estas 'trankvilaj'... kiel ĉi foje. Baldaŭ sekvis eksplodoj, etaj kaj egaj. Ja, lastnokte okazis kelkaj (mi nombris 4) eksplodegoj, ja okazis novaj 'tertremoj'. Ne estis agrable. Malgraŭ la bruon aspektis al mi ke la eksplodoj tamen ne estas tiel proksimaj. Sed mi ne certis. Dum la tago oni konfirmis mian supozon. La atakoj eĉ ne okazis je la nordokcidenta urboparto. Bomb-celoj estis ĉirkaŭ la urbo (kelkaj pontoj kaj subpasejoj ankaŭ je aŭtovojoj Beogrado-Niŝ-Skopje kaj Beogrado-Niŝ-Sofio). Ja kia bruo kaj 'tertremo' estus se la bomboj falis ie en la urbo?! La atako finis post dudekon da minutoj. Mi tamen pensas ke unu el la celoj estis ankaŭ la centraj elektrikaj instalaĵoj (je 3-4 km oriente de mia domo). Forta defend-pafado estis aŭdebla, unu-du eksplodoj kaj traflugo de aviadilo... sed ŝajnas ke la atako ne sukcesis, t.e. la defendo sukcesis, la elektriko ne malaperis... La 'spektaklo' finiĝis.

## 28-05-99, 15:20 h

Nek ĉi matene mi sukcesis forsendi la pretitajn mesaĝojn. Mi provados daŭre. Intertempe, mi uzas la okazon...

Ĉirkaŭ Beogrado atakoj al la elektrikaj instalaĵoj sukcesis. La damaĝo estas granda kaj facile povus okazi ke Beogrado eĉ dum kelkaj tagoj ne havos elektrikon. Nek hodiaŭ ili tie havas elektrikon.

...Ĵus okazis du eksplodoj kaj oni povis aŭdi aviadilon... (Do, du aviadilaj rakedoj ie falis kaj detruis ion) Fakte ja la aer-ataka danĝero estas anoncita jam je la 10:30 horo. Ke mi tion forgesis, estas alia afero...

Krom Beogrado, plej suferis denove Aleksinac, la urbeto je 30 km norde de Niŝ. La urbocentro estas denove trafita, kelkaj domoj estas plene detruitaj. Ĝis nun estas trovitaj 3 mortigitaj personoj... Ankaŭ multaj aliaj lokoj kaj urboj daŭre estas bomb-celoj. Pli detale pri ĉio ie je: www.cento.co.yu (angle kaj serbe).

Ĉi nokte kaj dum la tago, krom tiuj du "antaŭ kelkminutajn" rakedoj..., ....ĵus traflugadas unu aviadilo super... Ŝajnas iom pli malalte - la aviadil-motora bruo estas tre bone aŭdebla kaj forta. Alie mi apenaŭ, kiam ili flugas sufiĉe alte, povas aŭdi aviadilan bruon pro la "urba" (trapaso de la veturiloj, radio 'muzikas', birdoj kantas en la korto...) bruo. La aviadilo traflugis...ĉi foje.

Do, dum la lasta nokto kaj hodiaŭa tago, ĝis nun, estis trankvile en Niŝ, malgraŭ la aer-ataka danĝero.

## 19:55 h

Mi ĵus eksciis pli pri hodiaŭaj, aparte posttagmezaj, okazaĵoj je niŝa TV-novajelsendo.

Ja tiuj aviadiloj, kiujn mi aŭdis dum mi skribis parton de ĉi mesaĝo... Ĉu ĝuste ili estis, mi ne certas, sed povus esti... nome proksimume je tiu tempo kiam mi aŭdis la superflugoj, okazis novaj atakoj ĉirkaŭ Niŝ.

Unu ponto ĉe Leskovac, urbeto je 40 km sude de Niŝ (por aviadiloj kiuj uzas rapidecojn de ĉ. 1000 kaj pli da km/h tia distanco estas ja nenio), estis atakita per 4 rakedoj. Du rakedoj trafis la ponton, mortigis tri personojn (28 jaraĝulon, lian patrinon kaj unu, ankoraŭ nekonatan, viron), kiuj ĝuste je tiu momento troviĝis tie, kaj detruis la ponton. (Ĉu eble tiuj du eksplodoj kiuj mi aŭdis skribante la mesaĝon?!) Je la tempo kiam mi denove aŭdis la superflugon estis atakitaj fervoja kaj aŭtovoja pontoj je direkto Niŝ-Pirot, t.e. Beogrado-Niŝ-Sofio.... La pontoj ne estas plene detruitaj ĉi foje...sed ja oni ne estas uzeblaj 'momente'... Do, nun mi praktike povas nenie vojaĝi per la trajno... La ligo kun Bulgario estis la nura ebleco ĝis ĉi posttagmezo...

Ŝajnas ke NATO rapidas je detruado ĉar baldaŭ oni tamen eble sukcesos fari ian politikan interkonsenton kaj poste oni ne rajtos bombardi pli...

Tamen, por ĉiu okazo, oni malpermesis al RTS uzi Eutelsat, t.e. RTS plu ne povas uzi la sateliton por siaj elsendoj… Ja "je demokratio ĉiu havas rajton je sia opinio..."

Antaŭtagmeze, laborante je tiu 'danĝera' vendejo mi aŭdis unu sufiĉe fortan frapon kaj aviadilon poste...(ja estas for la tempoj kiam oni unue aŭdas la aviadilojn kaj nur poste oni povas 'esperi' je iu frapo...nun oni unue mortigas kaj poste aŭdeblas...) Je tiu sama novaĵ-elsendo de NTV (Niŝa Televizio), ĵus menciita supre, oni montris la densan fumo-foston super la nordokcidenta parto de la urbo. (Mi nek tion sukcesis vidi, kvankam mi troviĝis pli proksime...). La rakedoj fakte trafis la apudan vilaĝon (je 4-5 km nordokcidente de Niŝ), ili damaĝis plej proksimajn domojn kaj vundis tri infanojn.

## 31-5-99: 21:40 h

Ja mi jam foje menciis ke ĉi 'milito' (temas fakte nur pri la bombardo kaj raketado) estas sufiĉe sperto-dona.

Hodiaŭ matene mi 'kolektis' novan sperton. Ĉi foje, por la unuan fojon, mi praktike vidis kiel aspektas unu el la eblaj ekologiaj katastrofoj...

Dum la tuta antaŭa nokto, dum la tuta hieraŭa tago kaj dum la lasta nokto oni povis aŭdadi la aviadilojn kaj, de tempo al tempo, eksplodojn. La damaĝado, detruado kaj mortigado daŭras. Nova, pli serioza atako al Niŝ okazis last-nokte, ĉ. 00:30. Mi finis la sendadon de la finitaj mesaĝoj kaj komencis pretadi por enlitiĝo kam aperis la aviadiloj. Sekvis ankaŭ eksplodoj. Okazis 4 sufiĉe fortaj eksplodoj de kiuj ankaŭ mia domo ekvibris. La fenestrojn mi jam delonge ne fermas, por ĉiu okazo, kaj la vitroj daŭre "bonfartas". Post la dua eksplodo la elektriko malaperis. Do, la 'apudaj' (je 3-4 km for oriente de mi) elektrikaj instalaĵoj denove estis la celo.

...Matene kiam mi ekrigardis orienten mi rimarkis grandan tre densan kaj tre nigran fuman nubon irantan al mi! Mi tuj foriris al la tegmento por 'esplori' la aferon. Hmm, tute ne agrabla situacio estis. Imagu: vi povas nenion fari; nur stari kaj rigardi; la grandega nigra nubo proksimiĝas al vi... (Ĉu vi foje spertiĝis kiel aspektas se al vi proksimiĝas grandega potenca ŝipego kaj vi tute havas nenian eblecon fari ion ajn, nek malproksimiĝi...?) Mi neniam spertiĝis ĉi, sed sur la tegmento mi havis ĝuste tian senton...) Se vere unu el la transformatoro estis trafita kaj bruligita...la nubo plej verŝajne estis toksa. Oni jam foje parolis pri ebleco ke, se iu transformatora konstruaĵo estos atakata, la transformatora oleo plej facile povus ekbruligi kaj tio estus ja tre danĝere ĉar tiu minerala oleo, uzata por malvarmigi la transformatorojn, estas toksa => do ankaŭ la bruligo, t.e. la fumo estus sufiĉe danĝera. Ĝuste tia unu grandega nubo staris antaŭ mi... Tre minace ĝi aspektis... Je malproksimeco mi rimarkis 'voston', t.e. foston de la nubo per kiu ĝi estis 'ligita' al la tero, ĝuste tie kie troviĝas tiuj grandaj kaj gravaj elektro-instalaĵaj transformatoroj. Tie

ja ĝi 'fontas'... Je tiu momento mi ja tre bone komprenis kiel aspektas kaj kio fakte je praktiko estas iu ekologia katastrofo! Mi sekvis ĉu tiu nubo proksimiĝas kaj ĉu ĝi eble ne malleviĝas. La tuta orienta ĉielo estis kovrita per tiu nubo. Malgraŭ tute sennuba (mi pensas je tiuj naturaj nuboj) ĉielo, la sunon oni ne povis vidi. Sed multe pli danĝera estus se la nubo malleviĝus...sufiĉe granda parto de la urbo estus plene kovrita per la nubo.. oni plej verŝajne ne povus normale spiri... Do, la eko-katastrofo okazis. La nubo tamen ne malleviĝis...sed la aero estas certe sufiĉe malpurigita.... Rigardante la nubon mi ankaŭ plene komprenis kion, almenaŭ proksimume (tie estis multe pli teruraj kaj pli grandaj nuboj), spertiĝis la loĝantoj en Novi Sad kaj en Panĉevo kiam la aviadiloj de NATO bruligis la petrol-fabrikojn. Ankaŭ Beogrado estis danĝerita de la panĉeva bruligo. La situacio tie ja estis vere kritika! Oni plurfoje informis la loĝantaron ke ili, por ĉiu okazo pretigu malsekajn naztukojn, se oni ne havas ajnan gasmaskon, por povi almenaŭ parte 'purigi' la enspiran aeron. Kiam fine tiuj (ne-niŝaj) fumnuboj malaperis, post kelkaj tagoj oni informis pri sufiĉe acidaj pluvoj, ankaŭ en Rumanio!

Kio okazos ĉi tie ja ni spertiĝos... Feliĉe la Naturo denove venkis! /Ĝis kiam la Naturo daŭre sukcesos venkadi ni (la tuta mondo), bedaŭrinde eble eĉ ekscios se oni ne faros ion pli saĝe intertempe...mi ne pensas nur pri ĉi bombardo, mi ja pensas pri ĉiuj nenaturaj, pli ĝuste, kontraŭ-naturaj agadoj de la homaro....ĉiutagaj!!!/ La fum-nubo, ĉ. la deka horo, tamen malaperis. Dum la tuta tago oni povis senti je aero ian nekutiman 'guston' kaj odoron....

## 01-06-99, 06:50 h

La nokto estis trankvila... Sed ne ĉie estis. Pluraj lokoj ankaŭ ĉi nokte tre suferis... Novaj du transformatoroj estis trafitaj ĉe Beogrado... (nun mi, jam kiel 'spertulo', povas diri ke tio ja estas vere danĝera afero. Ne nur ke la elektriko nun mankas al la preskaŭ tuta urbo kaj parte ankaŭ al Vojvodino, sed se ankaŭ bruligo sekvis la atakojn, kio plej verŝajne okazis... do aperis novaj du minacaj fumoj...Novaj atakoj ankaŭ al la Naturo...! Ĝis kiam la Naturo toleros nin homojn...ni ĉiuj foje eble ekscios. Mi mem tute ne ŝatus ian tian sperton!!!)

La sirenoj ĵus anoncis 'regulan' matenan ĉeson de la aer-ataka danĝero. Do, komencas nova tute ordinara tago. Baldaŭ oni denove anoncos novajn aer-atakajn eblecojn, la politikistoj rakontas ke ĉi semajno devus esti decida por politika solvo de la kosova krizo, ja oni supozas ke ĝis fino de ĉi monato (junio) oni devus ordigi ĉion kaj ke oni devus je ĉiu okazo eviti ke ĉio ĉi ne daŭros ĝis la vintro... alie ĉio ĉi povus tiam eble fini nur je printempo venontjare.... He...mi iom troigis... ili ĝis nun menciis nur la vintron, mi 'erare' aldonis tiun printempan eblecon...

Ĝis iam

*Zoran*

## 1-6-99: 21:37 h

En Niŝ daŭre trankvilas (de hieraŭ), Niŝ daŭre havas elektrikon...jam la duan tagon. / Ja sufiĉe bonaj kialoj por novaj atakoj./ Ĉar la elektriko 'fluas' mi uzas okazon por skribi ion kvankam preskaŭ nenion novan okazis en Niŝ. Tamen, je ĉi situacio, la fakto ke mi daŭre havas elektrikon estas novaĵo. (En Beogrado ili havas nek elektrikon nek akvon... La akvo-'fabriko' ankaŭ bezonas elektrikon por la funkciado... La elektrikaj instalaĵoj estas tre damaĝitaj kaj beogradanoj havos sufiĉe da problemoj dum almenaŭ kelkaj tagoj...eble eĉ plu!)

Homo hodiaŭ menciis ke li aŭdis ke por ĉi nokto oni planas atakoj al niŝaj elektro-instalaĵoj... Se eĉ la atakoj okazos, mi esperas ke la defendaj fortoj sukcesos defendi la elektrikaĵoj. Alie ankaŭ ni dum iu certa tempo ne havos elektrikon. Mi esperas ke ĉi ne okazos, sed neniu scias, verŝajne nek NATOuloj scias kio okazos ĉi nokte....

Por ke mi evitu eventualan bombardon kaj eventualan elektrikan malŝaltigon mi tuj finas... por ĉiu okazo. Poste, eble, mi ne havos okazon...

## 4-6-99: 22:35 h

Mi ĵus revenis de la tegmento. Ĉi foje, tute ne temis pri la aviadiloj. Supre mi simple iom rigardis la veter-ŝanĝado. Post la sufiĉe sufoka tago, posttagmeze de nord-oriento aperis densaj pluv-nuboj. Ja ili aspektis serioze. Ĝin mi rimarkis jam je la frua posttagmezo, sed nur kiam malaperis la taglumo (do, vespere) oni povis rimarki ankaŭ fulm-lumadon. Reventinte hejmen mi tuj foriris je la tegmento por iom spektadi la naturan spektaklon. Estis interese. La strat-lumojn daŭre oni ne ŝaltigas dum noktoj (la homoj jam plene alkutimiĝis al ĉi situacio, tiom ke eĉ estus iom nekutime nun se la strataj lumoj funkcius.Krome, ĉi tiel pli belas...) kaj oni povis plene ĝui la spektaklon. Tre klare oni povis vidi fulmojn... nur la bruo (tondrado) plene mankis, aŭ ĝi simple estis neaŭdebla. Ĉiu okaze la 'prezentaĵo' tre memorigis min je kosmaj lumaĵoj... Eble ĝuste pro tiu 'son-manko'. En la kosmo regas la silenteco...(Ĉu vi foje spektis ilin je iu scienc-populara TV-elsendaĵo aŭ je iu scienc-fikcia filmo? Ĝuste tiel aspektis...) Sed pri ankoraŭ ion mi pensadis rigardante tiujn ĉielajn okazaĵojn. Nome, ĉu la metereologiaj armiloj jam pretas, t.e. ĉu oni jam kapablas rekte influi la veterajn okazaĵojn milit-cele? Pri ĉi mi unue ekpensis kiam oni anoncis pri la fortaj ŝtormoj akompanitaj per hajlegoj je kelkaj lokoj. Krome, antaŭ unu-du semajnoj, oni povis rimarki vere neordinaran ĉiel-lumado super nia regiono (orienta Serbio). La klarigo por ĉi lumado estas ke oni (NATO-aviadiloj) detruas la nubojn (ĉar ili tre ĝenas je plipreciza bombardado). Oni vere povis rimarki ian similan, sed pli ruĝecan, ĉiel-lumadon dum du vesperoj...

Ja kolektado de novaj spertoj daŭras....

## 6-6-99: Ĉu la lasta tago? 06-06-99, 17:13 h

En Kumanovo, Makedonio, ĵus daŭras interkonsentado pri 'paca solvo de la kosova krizo', t.e. la reprezentantoj de UN kaj de Jugoslavio interkonsentadas pri la manieroj ŝanĝi jugoslaviaj policiaj kaj armeaj fortoj por UN-fortoj. La subskribo de tiu kontrakto signifos ankaŭ haltigon de NATO-bombardo. Oni atendas ke baldaŭ, eble jam ĉi vespere, oni finu la interkonsentadon...

Intertempe.

En Niŝ la suno brilas, la temperaturo altas kaj la vento komencis blovegi. Pretiĝas la veter-ŝanĝo, la pluvegoj eblos... Nur, ĉi foje mi ne okupiĝos pri la meteorologiaĵoj.

Ke halto de la bombardo pretiĝas ja oni povis jam rimarki. Antaŭ du tagoj la serba parlamento akceptis la proponitan pac-kontrakton. NATO tuj limigis siajn atakojn nur al armeaj celoj, almenaŭ je ne-kosova parto de Jugoslavio. Je Kosovo la bombardo daŭras je pluraj lokoj, aparte ĉe la jugoslav-albana landlimo... La unuan esperon, post la parlamenta decido, ĉ. 00:35 h, la aviadiloj tri foje traflugis Niŝ, sen ajna bombardo... Hieraŭ estis 'rompita' son-muro (teknika esprimo...) /La rompado de son-muroj per aviadiloj (kiuj kapablas je rapidecoj pli grandaj ol la rapideco de la sono -kiu rememoras la studadon de fiziko povas kompreni pri kio temas) super urboj en la mondo, ankaŭ ĉi tie, estas malpermesata. La bruo de tia rompado timas homojn kaj povas fari damaĝon al la konstruaĵoj, aparte je fenestroj.../ ŝatata 'ludo' de NATO-pilotoj super jugoslaviaj urboj dum lastaj du monatoj. Hodiaŭ, ĉ. 10:30 h unu rompo de la 'muro' kaj ĉ. 11:30 du sinsekvaj frapoj. Al mi pli aspektis al la frapo de du rakedoj ol al novaj 'mur-rompoj'... Ŝajnas ke Niŝ plu ne estos atakata per bomboj. Tiuj bruaj ludoj ankoraŭ iom daŭros, eble ankaŭ post veno de UN fortoj je Kosovo... sed la afero trankviliĝas... Mi ne ŝatas paroli antaŭe... la plej certa afero

estas finita afero... la supozoj neniam certas.... Tamen, ĉi foje, se ne okazos iuj neantaŭviditaj okazaĵoj, mi eble jam nun povus anonci finon de bombardo, almenaŭ je Niŝ... Elektrikon ni en Niŝ jam dum kelkaj tagoj senĉese havas. La ponto restis nur damaĝita (la aliaj tri restis 'trankvilaj')... Nur tiu nordokcidenta parto de la urbo plej suferis. Inter aliaj fabrikoj kaj entreprenoj, la tabak-fabriko plej multe 'suferis'. La cigared-produktado estas preskaŭ plene haltigita kaj la cigared-manko regas ĉi tie jam dum tri-kvar semajnoj. La fumantoj tre suferas ne povante tiel facile atingi siajn 'porciojn' da nikotinaĵon...

La aviadilojn oni ne aŭdas, la sirenoj silentas, la aer-ataka danĝero ne estis anoncita...ankoraŭ unu trankvila nokto estos, homoj povos senzorge dormi...

## 7-6-99: 05:43 horo

Oni ne sukcesis interkonsenti pri ĉiuj punktoj en Kumanovo. Tamen NATO daŭre ĉefrolas. Ankaŭ en Kumanovo ili daŭre insistas pri kompleta foriro de policiaj kaj armeaj ŝtataj fortoj de Kosovo, inkluzive limsoldatojn kaj regulaj policaj (pac-tempaj/ ordinaraj) fortoj. La dua punkto kie oni ne sukcesis plene interkonsenti: senkontrola reveno de la albanaj rifuĝintoj. La jugoslaviaj reprezentantoj ne povas akcepti ĉi ĉar certe inter veraj rifuĝintoj oni intencas enĵeti amason da "Liber-armiaj" soldatoj...dum ĉi nokto nova provo de 'Liber-armiaj' por perforte (perarmile) eniri kosovan teritorion el Albanio okazis. La limsoldatoj ne "permesis" eniron. Nun oni atendas la rezolucion de UN. Intertempe NATO daŭros la bombardon ĉar iliaj postuloj daŭre ne estas akceptitaj plene...

Niŝ, iom post iom, vekiĝas. Nova tago komencas. Pluvos hodiaŭ.

## 9-6-99: Ĉu fino? 09-06-99, 22:43 h

Ŝajnas ke bombardo baldaŭ (jam morgaŭ) haltos. Niŝa Radio-televida entrepreno (TV 5) ĵus elsendis la informon ke la kontrakto inter jugoslaviaj kaj NATO/UN fortoj estas subskribita en Kumanovo. Baldaŭ ankaŭ praktike ni ekscios. Ekstere ĵus komencis pistola kaj pafila pafado... Je la unua momento mi ekpensis ke oni pafas (festas) pro la plej novan venkon de jugoslavia rugbea (Ĉu vere oni ne havas alian vorton por ĉi sporto kies mond-konkuro ĵus okazadas en Egiptio?!) teamo. Sed estis strange al mi ke oni festas tiun venkon, ja ankoraŭ ne estas mond-ĉampiona maĉo... Ekstere estas kvazaŭ milito... Fakte oni ĉi tiel tute ne pafadis dum daŭris NATO atakoj. Nur bomboj faladis... nun ekstere okazadas strataj pafadoj... La radio-raportisto ĵus konfirmis ke la pafado okazas ĝuste pro la subskribo de tiu milita kontrakto, kio devus signifi ankaŭ haltigon de la bombardo. Se ĉi veras... ja la afero bonas. Tamen, mi mem ne ŝatas tro ĝojiĝi anticipe. Tro mi ne kredas al la politikistoj ĝis mi ankaŭ praktike ne vidas realigon de la promesoj kaj eldiroj. Krome, la okazaĵoj tute ne estas por ajna festado! Fakte haltigo de la bombardo bonas, sed la kosova krizo tute ne devis okazi. RTS verŝajne komencos informadi pri la sukcesa defendo kaj eĉ venko je ĉi konflikto... Ekstere eĉ tiuj kontraŭ aviadilaj armiloj estas aŭdeblaj. (Nur avidiloj mankas...) Do, ni vidos kiel la aferoj aspektos de morgaŭ. Intertempe la homoj esperas ke relative rapide sekvos politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj...

## Do, fino! 11-06-99, 22:30 h

Pro la troa laboro (kelkajn kamionoj da biero ni disvendis ankaŭ ĉi semajne - pro kio ni laboris dum la tutaj tagoj (tamen nur la laboro multas, la salajr-mono ne tiom)) mi ne sukcesis sekvi la okazaĵ-informadon. Mi ankoraŭ interesiĝas kiu komencis tiun festadon de la "venko"? Kaj ne nur mi. Aspektas ke pli multo estis kontraŭ tiu paf-festado. Preskaŭ ĉiuj aĉetantoj komentis la festadon kaj kelkaj eĉ estis tro koleraj pro tio. Ja la afero tute ne estis por la festado.

Ĉiu okaze. La bombardo haltis. Nun oni politike daŭrigos la 'laboron'. Kiel aspektos ni vidos...

## 12-6-99: 07:30 h

He, ĉi nokte okazis nova "kurado por Berlino"! Ĉiuj estis surprizita per subita apero de rusaj fortoj je Kosovo. Aparte la NATO-uloj...ja ili neniam ion scias... Ĉi foje ili vere sciis nenion... Vere tiu usona administracio estas tro ambicia. Je ĉio ili ŝatas kaj deziras esti la unuaj... Sed ne ĉiam eblas... Ĉi matene oni informas ke usona administracio akceptas klarigon ke temas pri la eraro... Do, la politika solvado komencas... Sed pri ĉi tiaj kaj estontaj politikaj okazaĵoj kosovaj vi povos ekscii pere de via-landaj kaj aliaj informiloj.

Per ĉi mi finas la 'milit-informadon'. Nun en Niŝ homoj plene revenos al siaj ĉiutagaj devoj kaj zorgoj. Ĉiuj servoj kaj entreprenoj rapide revenos al kutimaj labor-tempoj kaj labor-manieroj. Ankaŭ rekonstruado komencos (kvankam mi lasus unu-du ruinoj por esti monumentoj pri la NATO-bombardo) kaj esperelble ankaŭ politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj fine ekos kaj okazos. La sirenoj plu ne 'muzikas', la aviadiloj (almenaŭ ne bomb-cele) plu ne flugas /kvankam la bombard-minacoj restas - ja se oni ne kondukos sin bone tuj oni reuzos 'demokratiajn' rimedojn por realigi demokration ĉi tie.../, la "vesper-mesaĝoj" plu ne aperos... Nun oni devas alkutimiĝi al la paco. Oni bezonos iom da tempo por vere certiĝi ke ĉio finiĝis, ke oni povas estonte trankvile iri trans la pontoj... "Ĉu vi scias kiel oni trapasadis la stratojn en Beogrado? Oni unue rigardas maldekstren, dekstren kaj supren."

Mi esperas ke vi (r)estas pli-malpli kontenta pri la informado. Esperante ke mi ne havos novan okazon por la "vesper-mesaĝoj" mi salutas vin ĉiujn kaj dankas por via pacienco.

Plej sinceran saluton el Niŝ, Serbio, Jugoslavio, Europo.

## 13-6-99, vespere:

Foje mi menciis ankaŭ la 'fantaziecon' de la problemoj. Jen ankoraŭ unu ekzemplo. Mi nur nun sukcesas forsendi la lastajn mesaĝojn ĉar antaŭ kelkaj tagoj aperis nova 'problemeto' (por tempomanko mi bezonis pli da tempo por solvi ĝin). Nome la komputilo ne povis elteni la varmegon, eksteran kaj internan. Mi devis ŝanĝi la komputil-ventolilon kiu 'prizorgas' la komputil-procesoron. Nun, kun pli grandan kaj pli fortan ventolilon, la sistemo funkcias...

Mi ne ĝenos pli al vi.

Ĝis

# *Reagoj*

X-From_: kongreso@svn.com.br Mon Jun 14 00:52:40 1999

Bonvolu arigi, sistemigi kaj ordigi la tutan mesaĝaron de vi senditan kaj publikigu ĝin per libro. Certe viaj impresoj kaj kuraĝo estos bone interesaj al ĉiuj, speciale al tiuj kiuj ne havis la oportunon legi ĉiutage viajn mesaĝojn dum la bombardado. Amike via!

Mi estas duoble feliĉa. Unue ĉar finiĝis tiu hirtiga bombardado. Due ĉar vi, Zoran, mia heroo dum tiu okazaĵo, eliris vivanta el tiu situacio!

*Joseniltou kongreso@svn.com.br*

From: Francesco Amerio
<f.amerio@agora.stm.it>

Kara Zoran, Gekaraj aliaj,

MI, NI, devas danki vin pro via 72-taga "pacienco".

Mi petas vin saluti ĉiujn geamikoj, kaj substreki kiel multaj (eble la plej multo) el ni absolute malaprobis tiun ĉi frenezaĵon.

Nun tamen, eble, ni povos ion alian aranĝi por Serbio: antaŭ kelkaj semajnoj, dum la unuaj milit-tagoj, mi mesaĝis kun vi pri la ebleco aranĝi labor-brigadon en Serbio dum tiu-ĉi somero.

Ĉu laŭ vi ĝi estas ebla??

Kion opinias la aliaj??

Ĉu Serbejo pretas tion aranĝi kaj kunordigi??

Ĝis baldaŭ!

*Francesco Amerio*

## USONO ofertas 5 milionoj da dolaroj ŝanĝe de serbaj gvidantoj

La 24-an de junio Usono ofertis premion de 5 000 000 dolaroj al ĉiuj, kiuj donu informon ebligantan kapti Prezidanton Slobodan Miloseviĉ kaj aliajn personojn kulpigitajn pri militokrimoj en Kosovo.

Aliflanke, Jugoslava Parlamento aprobis proponon de la registaro por




fini la militan estaton. Jugoslava Ĉefministro, Momir Bulatovic, profitis la okazon por peti, ke Jugoslavio denove estu akceptita kiel membron de Unuiĝintaj Nacioj.

## Serboj forlasas

## Kosovon, timante reprezaliojn

Preĝejo de Benitaj Caroj de Urosevac eksilentis hieraŭ. Ties pastro estis ferminta la pordojn kaj forlasinta la urbon kune kun la 90% de ties preĝejanaro la 23-an de junio. Kiam la restantaj serboj provis malfermi la pordojn pezajn, ili vidis, ke ili ne plu povis eniri. La moskeo urba kuŝas 20 metroj for, kaj tion oni povus konsideri vera simbolo pri paca kunvivo, se imamo Adem Hoxha estus parolinta eĉ unufoje al ortodoksaj preĝistoj dum 18-a jaroj.

Nun estas krimoj en Kosovo, fare de albanoj kosovaj. Britaj militistoj plendas, ke ili ne povas garantii, ke ne okazos pluajn murdojn. Kial ili militis, tiam? La Porlibera Kosova Armeo nun diras, ke ciganoj mortigas kaj rabas serbojn -ĉu same ili tion faris pri albanoj antaŭe? Interesa demando por la Internacia Tribunalo pri Militaj Krimoj en Kosovo...



Milito en Jugoslavio. Al kiu profitas?

# Reguloj por ke via infano iĝu krimulo

1 Dekomence, donu al via infano ĉion, kion li aŭ ŝi volas. Tiel li aŭ ŝi kreskos pensante, ke la mondo ŝuldas ĉion al li aŭ ŝi.

2 Kiam li diras fivortojn, ridu. Tio pensigos al li aŭ ŝi, ke li aŭ ŝi estas amuza.

3 Ne instruu al li aŭ ŝi pri religio aŭ moralo. Atendu ĝis kiam li aŭ ŝi estos dekokjaraĝa, kaj tiam lasu lin aŭ ŝin elekti.

4 Permesu al li aŭ ŝi legi ion ajn presitan, kiun trafu lian aŭ ŝian manon, kaj ankaŭ iun ajn filmon aŭ televidan programon, inkluzive de pornografio. Zurgu, ke ĉio ĉe manĝotablo estu purigita kaj senmikroba, sed permesu al la menso de via infano engluti iun ajn putraĵon.

5 Kolekti el la planko ĉion, kion li aŭ ŝi lasas tie, kie li aŭ ŝi pasas: tornistron, ĉemizojn, pantalonon..., kaj faru ĉion anstataŭ li aŭ ŝi, tiel, ke lia aŭ ŝia respondeco estu afero de ceteraj personoj.

6 Evitu uzon de vortoj *eraro* kaj *kulpo*. Tio kondiĉigos lin aŭ ŝin konsideri poste, kiam oni enkarcerigos lin aŭ ŝin pro rabo, ke societo estas kontraŭ li aŭ ŝi, kiu estas simple persekutita kaj marĝenigita.

7 Kverelu kutime presence de viaj infanoj. Tiel, ili ne miros, ke familio disiĝos.

8 Donu al via infano tiom da mono, kiom li aŭ ŝi volos. Kial li aŭ ŝi devas lukti tiel dure kiel vi mem faris?

9 Malsatigu ĉiun kapricon kaj dezirojn de via infano. Neo povas kaŭzi doloran malsukcesigon al li aŭ ŝi.

10 Defendu vian infanon ĉiam kontraŭ najbaroj, polico, Sociaj Servoj, aŭ juĝistoj. Ĉiuj antaŭjuĝas vian infanon.

11 Instruu lin aŭ ŝin kiel mensogi kaj nei evidenton. Kio okazas estas, ke oni volas kulpigi vian infanon.

12 Kiam li aŭ ŝi eniras seriozan problemon, senkulpigu lin aŭ ŝin dirante, ke *mi neniam sukcesis instrui lin* (aŭ *ŝin*).

13 Portu lin aŭ ŝin al eminenta psikiatro: li aŭ ŝi trovos certe ian ajn malsanon mensan. Tial vi trankviliĝos, trovante, ke vi nenion jam povas fari.

14 Pretigu vin por vivo plenplena de ĉagreno. Vi certe havos ĝin.

*Anonima manuskripto trovita en juĝejo*



# Enkonduko en muziko

## *Voĉoj*

Per *Frato Javo* ni kontraŭstaris *melodion* kaj *harmonion*. La unua estas simpla kanto, kaj ĝi estas la plej malnova formo de muziko. *Harmonio* estas kanto farita de du aŭ pli diversaj melodioj samtempaj. Je la 3-a mezuro de *Frato Javo* aperis dua voĉo per ripeto de tio, kion ni ĵus aŭskultis, kreante tiel *duopon* (tradicie nomita *duo*); kaj je la kvina mezuro aperas denove novan voĉon, kiu kreas kune kun la aliaj kantantaj voĉoj *triopon* (*trio*). Por ke la tuto sonu bele, ne ĉiu noto povas soni samtempe kiel iu ajn alia. Kiujn notojn bezonas oni kunigi por ke la tuto sonu bele estas la studcelo de *Harmonio*. Ni revenos poste al tio ĉi en nia kurso.

Homaj voĉoj estas: soprano, kontraŭalto (kromnomita simple *alto*), tenoro kaj baso. La du unuaj estas kutime virinaj; kaj la du lastaj, viraj. Sed tre ofte oni ankaŭ uzas mezvoĉojn: *mezosoprano* (aŭ simple *mezo*), kiu estas malpli alta ol soprano, sed pli alta ol kontraŭalto; kaj *baritono*, kiu altas inter tenoro kaj baso. Tradicie la tri plej altaj voĉoj estas inaj, kiel mi diris, kaj viraj la aliaj, sed geinfanoj ankaŭ povas soprani aŭ alti, kaj ankaŭ apartaj viroj povas *falsigi* siajn voĉojn kaj kanti oktavon pli altan, atingante tiel la sopranan, mezan aŭ altan *registron* aŭ gamon. Dum teruraj pasintaj tempoj oni kreis *kastrati* amputante seksorganojn al virinfanoj por ke ili konservu sian inan voĉon, ĝis Napoleono malpermesis tiun barbaran kutimon.

*Gamo* aŭ *registro* estas la ensemblo de notsinsekvaj sonoj kiujn voĉo (homa aŭ instrumenta) povas kanti. Kiel dirite, la referncsono estas noto *la* (a), kies frekvenco estas 440 vibracioj per sekundo. Sekve, la soprana gamo estas:




La *alta gamo* estas tiu:




Jen la *tenora gamo*:




Kaj, fine, la *basa gamo*:



Ni vidas, ke la basa gamo estas tute ekster la pentagramo. Por ke la gamo internas al pentagramo, oni inventis aliajn *klavojn*. Ili estas klavo  de *do* kaj klavo de *fa* . Uzante la klavo de fa en kvara linio, jen la gamoj de tenoro



kaj baso:



# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461,
E30080 MURCIA,
HISPANIO**

**Retskribu al
hale@distrito.com**

**http://www.distrito.com/esperanto/kajeroj.htm**

**http://www.dragonfire.net/~Esperanto/kajeroj.htm**



Honore kaj respekteme al murditoj de tiu faŝisma milito stulta.

**Depósito legal: Z-2398-88**
**Presejo: Alegría.**